

## INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

### Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

### Kunlaborantoj

#### de la aktuala numero:

Karlo Alofa

Luiza Carol

Johan Derks

R. Despradel Hernández

Mireille Grosjean

Julián Hernández Angulo

Isikawa Tiekō

Marija Jerković

Dennis Keefe

József Németh

Radojica Petrović

Renée Triolle

Wei Yubin



## ENHAVO

Enkonduko (Mireille GROSJEAN) .....	3
Renée TRIOLLE: <i>Esperanto: ĉu kaŝita interkulturilo?</i> .....	4
Profesorino Ilona Koutny ricevis en 2018 la FAME-kulturpremion .....	10
Mireille GROSJEAN: <i>Kultura heredaĵo de Esperanto</i> .....	12
WEI Yubin „Jado”: <i>Solenaĵoj</i> .....	19
Dennis KEEFE: <i>Praktika utiligado de la silentaj filmoj de Chaplin (2.)</i> .....	23
Mireille GROSJEAN: <i>Ardo kaj pasio</i> .....	29
Komuna Legado okaze de la Tago de la Libro (M.GROSJEAN, J.HERNÁNDEZ A.) .....	31
<i>Dek jaroj en Esperanto-lando (6.)</i> (Luiza CAROL, Mireille GROSJEAN) .....	33
Mireille GROSJEAN: <i>El kiu fonto vi trinkas?</i> .....	37
Johan DERKS: <i>La koruptado de reguloj el la Fundamento</i> .....	38
Marija JERKOVIĈ: <i>Kontribuo de e-istoj al la kultura progreso de Bjelovar [...] ...</i>	41
Mireille GROSJEAN: <i>Improvizado</i> .....	42
El la landoj kaj sekcioj (BJ, CN, DO, FR, HU, IL, JP) .....	45
Mireille GROSJEAN: <i>Esperanto en universitatoj</i> .....	51
ILEI-kongreso 2019 – pliaj informoj (Radojica PETROVIĈ) .....	52
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj .....	53

## ESTRARO DE LA LIGO

**Prezidanto:** Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Kunordiganto de la estrara laboro. Eksteraj rilatoj (UNESKO, FIPLV kaj aliaj). Informado pri la Ligo. Observanto de ILEI en la estraro de UEA kaj Komitatano A ĉe UEA. Eldonado de la du revuoj de ILEI.

**Sekretario:** Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <lena\_espero@mail.ru>.

**Estrarano pri financaj aferoj:** William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.

**Vic-prizorganto de financaj aferoj:** Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, Tel. poŝ.: (+374) 055-27-99-06. <karinko\_arm@mail.ru>

**Estrarano pri Kongresoj:** Radojica PETROVIĈ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Ĉaĉak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>.

**Estrarano:** Ivan COLLING, DEPAC/UFPR, Ed. Dom Pedro I, Rua Gal. Carneiro, 560, Primeiro. Andar, Centro, BR-80060-150, Curitiba, PR, Brazilo. <iecolling@yahoo.com.br>. Eldonado de la Manlibro pri Instruado de Esperanto

**Estrarano:** JUNG Yuro „Unika”, 403, Grandmer, 2-4 Harigaya 2, Fujimi, Saitama JP-354-0017, Japanio. Tel. poŝ.: (+81) 70-5569-6771. <yurjun@st.amu.edu.pl>. Reta komunikado, asistanto en kongresaj aferoj, TEJO.

## *Scienca Komitato*

**Prezidanto: Humphrey Tonkin,**  
Usono, University of Hartford;  
AdE<sup>1</sup>

### **Membroj:**

**Duncan Charters,** Usono,  
Principia College, Elsah

**Renato Corsetti,** Britio/Italio,  
Università degli Studi di Roma  
„La Sapienza”; AdE<sup>1</sup>

**Probal Dasgupta,** Barato, LRU,  
Indian Statistical Institute,  
Kolkata; AdE<sup>1</sup>

**Aloyzas Gudavičius,** Litovio,  
Šiaulių universitetas

**Boris Kolker,** Usono; AdE<sup>1</sup>

**Ilona Koutny,** Pollando/  
Hungario, Uniwersytet im.  
Adama Mickiewicza w  
Poznaniu; AdE<sup>1</sup>

**Stefan MacGill,** Nov-Zelando/  
Hungario, vic-prez. de UEA

**Aleksandr Melnikov,** Rusio,  
Академия Сельскохозяй-  
ственного Машиностроения

**Radojica Petrović,** Serbio,  
Univerzitet u Kragujevcu

**Balázs Wacha,** Hungario, MTA  
Nyelvtudományi Intézet

---

<sup>1</sup> AdE – Akademio de  
Esperanto

### **Sur la titolkovrilo:**

Profesorino Ilona Koutny  
ricevis en 2018 la FAME-  
kulturpremion (vd p. 10).

### **Dorskovrile:**

„Ardo kaj pasio” – vd. la  
artikolon de Mireille Grosjean  
(p. 29.)

## *Enkonduko*

*Karaj legantoj,*

Jen la kvara numero de IPR por la jaro 2018. Laŭ la decido de la Komitato de ILEI en Pusan en 2017 tiu numero estas pli dika ol la aliaj. Ni maldikigis la tri unuajn numerojn, por sendi ilin kune kun *Juna Amiko* en pezo sub cent gramoj. Por konservi la jaran suman paĝonombron, ni eldonas nun pli ampleksan numeron, kiu flugos sola al via adreso, se vi mendas paperan version. Konsekvence vi havos pli por legi kaj ĝui.

En tiu ĉi numero vi trovos diversajn tekstojn, kiuj ankoraŭ rilatas al la temo KULTURO, kiu gvidis nin tra nia Kongreso en Madrido. Aliflanke vi trovos tekstojn, kiuj inspiros vin dum via instruado. Kiel kutime vi aŭdos eĥojn el la tuta mondo legante nian rubrikon *EL LA LANDOJ KAJ SEKCIOJ*.

Fine vi ekscios pri nia venontjara Kongreso en Ĉaĉak, Serbio, kaj ricevos instigon aliĝi. Ni tre antaŭĝojas vidi aŭ revidi vin en la balkana regiono en 2019.

*Mireille GROSJEAN*  
*Prezidanto de ILEI*

# ESPERANTO: ĈU KAŜITA INTERKULTURILO?

de Renée TRIOLLE (Francio), [triolle.renee@wanadoo.fr](mailto:triolle.renee@wanadoo.fr)

Grandaj institucioj, kiel UNESKO, konstante elstarigas interkulturon kaj kulturajn interŝanĝojn, sed plej ofte celas dulandan kunlaboron, kiel vi povas legi en la Universala Deklaracio de UNESKO pri kultura diverseco. Pere de Esperanto ni ĉiutage praktikas senkonscie interkulturon vojaĝante, gastigante eksterlandanojn, legante ĉefverkojn de la monda literaturo (ekz. serio Oriento Okcidento, eldonata de UEA). Kion fari por pli bone diskonigi nian avangardan sintenon, kiu baziĝas sur akcepto de diferencoj kaj ne altrudo de propra kulturo?

*Ŝlosilaj vortoj:*


kulturo: ne nur literaturo aŭ arto, sed ankaŭ vivmaniero, kultura diverseco: konstato, ke en la mondo la homoj vivas alimaniere;

interkulturo: konscio, ke ekzistas ne nur diferencoj sed pontoj inter la diversaj kulturoj.

Se ni esperantistoj scias, ke Esperanto helpas nin kompreni la kulturon de aliaj homoj, kiujn ni renkontis en kongreso, vizitis kadre de vojaĝo aŭ kun kiuj ni korespondas, tion aliaj homoj eble ne tiom konscias.

## 1. Kio estas interkulturo?

**1.1** Konstato, ke la aliaj ekzistas. Supozeble jam la romiaj soldatoj, kiuj invadis (la ceteran) Eŭropon aŭ Mediteraneon konsciis, ke ekzistas diferencoj en la vivmanieroj, same la katolikaj pastroj, kiuj iris al Sud-Ameriko, Afriko aŭ Azio, sed ili ĉiuj alvenis por premi la aliajn, altrudi sian vivmanieron aŭ religion, ne por dividi. En tiuj epokoj, neniu imagis, ke la lokuloj, la indiĝenoj, havas kulturon, kiu indas je studo. Eĉ Marko Polo, kiu iniciatis avangardan vojaĝon de Venecio al Ĉinio en la 13-a jarcento, pli raportas pri la pejzaĝoj ol pri la homoj. Ĉion vi povas legi en la traduko de Daniel Moirand *La libro*



*de la mirindaĵoj.* Same en la 18-a jarcento, „Jarcento de la Lumoj”, la franca verkisto Montesquieu uzas alilandanojn por primoki la francojn en siaj *Persaj leteroj*, ankaŭ tradukitaj en Esperanton. En Parizo, necesas atendi la finon de la 20-a jarcento, por ke muzeo estu dediĉita al la *Unuaj artoj* pro iniciato de prezidento Jacques Chirac (Ĵak Ŝirak), kiu tre ŝatis indiĝenajn artojn.

**1.2** Konsciigo pri tutmondiĝo. Sed verŝajne la rapida alveno de tutmondiĝo, kiu klare diskonigas la kulturon de la plej potenca lando, alarmis pri la danĝeroj de ununura pensmaniero. Tra filmoj, televidserioj, romanoj la tuta mondo konas kaj adoptas la usonan vivmanieron. Ekzemple, pri fianĉiĝo. En mia lando, Francio, fianĉo vizitis juveliston, elektis ringojn laŭ sia monujo, vizitis la butikon kun sia fianĉino, kiu elektis sian ringon. Nun emfaze, antaŭ publiko kaj surgenue la fianĉo sindeklaras, eĉ antaŭ la Eiffelturo kun violono! Ni ne plu ignoras, kiel manĝas, studas, murdas, juĝas Usono. Iu ajn eĉ duaranga verko (filmo aŭ romano) estas tradukata (aŭ ne... imagante, ke la tuta mondo parolas la anglan) por diskonigo al la tuta mondo. Komparu, kiom da islandaj verkoj estas alireblaj al la mongoloj? Kiom da filmoj (neusonaj) vi povas spekti en via urbo? Certe se ni vivus en la 19-a jarcento, mi same dirus pri la franca.

**1.3** Rolo de UNESKO kiel idelaboratorio. UNESKO, la organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo, de jaroj anticipas kaj lanĉas novajn ideojn. Tiel sub la mandato de la japano Koisjiro Macuura estis adoptita en 2001 „Universala Deklaracio pri Kultura Diverseco”.<sup>1</sup> Por konsciiĝi la homojn „kontraŭ fundamentistaj enfermiĝoj por pli malferma, pli kreema kaj pli demokratia mondo” (Audrey Azoulay (pron. Odre' Azule) / nuna Ĝenerala Direktoro).

En art. 1 „*Tiu diverseco estas enkorpiĝita en la unikeco kaj plureco de la identecoj de la grupoj kaj socioj, kiuj konsistigas la homaron. Kiel fonto de interŝanĝo, novigo kaj kreemo, kultura diverseco estas same necesa al la homaro kiel estas biodiverseco al la naturo. En tiu senco, ĝi estas komuna heredaĵo de la homaro kaj rekoninda kaj asertinda favore al la nuna kaj estontaj generacioj*”.


Komplika frazo por rekoni la neceson de kultura diverseco.

---

<sup>1</sup>Universala Deklaracio pri Kultura Diverseco. Por legi la kompletan tekston en la oficialaj lingvoj (ekz. franca per tajpado de fr) vidu [portal.unesco.org/fr/ev.php?URLID=13179&URL\\_DO=DO\\_TOPIC&URL\\_SECTION=201.html](http://portal.unesco.org/fr/ev.php?URLID=13179&URL_DO=DO_TOPIC&URL_SECTION=201.html)

En art. 5 „Kulturaj rajtoj estas integra parto de la homaj rajtoj, kiuj estas universalaj, nedivideblaj kaj interdependaj. La florado de krea diverseco neprigas la plenan realigon de kulturaj rajtoj... Sekve, ĉiuj homoj havas la rajton esprimi sin kaj krei kaj disvastigi siajn verkojn en la lingvo, kiun ili mem elektas, precipe en sia denaska, ĉiuj personoj rajtas al altkvalitaj edukado kaj trejnado, kiuj plene respektas ilian kulturen identecon; kaj ĉiuj homoj rajtas partopreni la kulturen vivon, kiun ili mem elektas, kaj plenumi siajn proprajn kulturajn morojn konforme al respekto de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj”.

Mi evidente elektis la artikolojn, kiuj plej interesas nin. Tiu sonas, kvazaŭ ni mem estus skribintaj tiujn liniojn, ĉar ni tre konscias pri la kulturaj rajtoj pri kiuj la reprezentantoj de UEA ĉe UNESKO batalis jam en la 70-aj jaroj.




## 2. Aliro al kulturo pere de Esperanto

Ni ofte ne plu perceptas, kiom „edukitaj kaj kleraj” ni estas rilate la homajn rajtojn de la tria generacio, la kulturajn, ĉar dank’ al Esperanto ni banas nin vole-nevole en ili.


**2.1** Mi memoras bazan lecionon pri „Kien?” Temas pri papilio, kiu flugas en la ĉambroN kaj falas en la supoN. Ĉetable sidas ruso, franco, ĉino kaj brito, kaj ĉiuj reagas alimaniere. En la 60-aj jaroj, kiam mi estis lernanta Esperanton, mi atentis nur pri la gramatika flanko kaj nun konscias, ke ĝi jam estis instrusigno de interkulturo. Ni esperantistoj, senkonscie kaj laŭsperte scias, kiujn demandojn ne fari. Mi unuafoje vere surpriziĝis, kiam mi demandis gaston „Ĉu vi bone dormis?”. Tute banala demando en Francio, ni ne atendas, ke homoj diru „mi sonĝis, mi ekdormis nur post unu horo, vekigiĝis je la 3-a, ktp”, sed britino estis vere ŝokita pro tiu, laŭ ŝi, maldeca demando.

Same, ni ne demandu la aĝon de la homoj, dum koreoj interesiĝos, ĉar en sia lingvo ili uzas aliajn vortumadojn depende de tio, ĉu la alia estas pli aŭ malpli aĝa. Mi memoras preskaŭ eksplodigan rimarkon de ĉina esperantisto al la bulgara reprezentanto de UNESKO en 1978 „vi estas maljuna”, dum la 40-jara bulgaro estus en okcidento „juna dinamika kadrulo”.



Same pri nombroj: se 13 estas aparta cifero por eŭropanoj, por la ĉinoj estas 4, por japanoj estas 9, kaj oni evitu ilin. Mi memoras UK-on en Israelo, kiam koreino estis vere ŝokita, ke en la komuna loĝejo oni ne apartigis virojn kaj virinojn en la ĉambro pro kutimo en kibucoj (konsciigite, la LKK tuj solvis la problemon en malmulte da minutoj). Ne parolante pri kisado: mia bonevo estas tre afabla kaj kisema kaj li brakumis kaj kisis japaninon, kiu gastis ĉe mi. Mi ne komentos ŝian surprizon kaj ŝokon. Tamen mia bonevo ne estas stulta, li estras urban malsanulejon kaj naŭ maljunulejojn, tamen interkulture li estas neklera. Pensu ankaŭ pri mankiso: en la libro de Mikaelo Bronŝtejn „Mi stelojn jungis al revado”, ni legas sur paĝo 107a „Indulgu la kamaradon, tie en Ukrainio, oni ne kutimas kisi la manojn de virinoj”. Tiu kutimo ekzistis en Pollando kaj grandparte malaperis. Alia bela ekzemplo, ĉe kiu mi regule stumblas, estas donaco: ĉu malfermi aŭ ne malfermi la pakaĵon? En kelkaj landoj necesas malfermi la donacon antaŭ la okuloj de la donacinto, ĝoji kaj danki; en aliaj landoj, nur danki. Mi legis humuran rakonton, kie la donaco daŭre malpakita iras de manoj al manoj kaj revenas al la unua donacinto! Mi povus listigi dekojn da malsimilaĵoj en la vivmaniero (per kiu piedo eniri domon, ne tosti krucante la brakojn ktp).

**2.2** Por konatiĝi kun la kulturo kaj literaturo de aliaj landoj, plej bonaj ekzemploj estas la tradukitaj verkoj. Ni disponas pri diversaj antologioj; ekz. la franca, kiu konsistas el kompletaj verkoj de la 16-a ĝis la 20-a jarcento (la ideo estis montri al la franca ministerio pri kulturo, ke tra Esperanto, ni diskonigas la francan kulturon al la tuta mondo), aŭ la hungara, sen paroli pri la finna *Kalevala*, kiun ni legis en Esperanto dum la traduko en la francan ankoraŭ ne ekzistis! Certe ĝi ankoraŭ ne estas tradukita en multajn lingvojn. Por ne resti en Eŭropo, kiuj inter viaj konatoj legas la librojn *Japanaj literaturaj juveloj* aŭ *Trezoro de arabaj proverboj*?



Por kontribui al la Universala Deklaracio de kultura diverseco, de jardekoj, Universala Esperanto-Asocio eldonas en la serio Oriento-Okcidento ĉef-verkojn de la monda literaturo, kiel ekz. *La vivo de Damoru* el la bengala aŭ *La tri rakontoj pri Kjeŭ* el la vjetnama.

Mi intence ne citas verkojn el pli disvastigitaj literaturoj kaj lingvoj, sed la tutan liston vi trovas ĉe UEA (kaj povas mendi ... kaj legi!).

**2.3** Prelegvojaĝoj estas bona vojo al kultura diverseco. La preleganto-vojaĝanto aŭ uzanto de Pasporta Servo estas akceptata de diversaj homoj, kiuj havas diversajn profesiojn, diversajn vivmanierojn kaj diversajn interesojn. Sekve dum diskuto li ricevas pli bonan ideon pri la vizitata lando ol banala ne-esperantisto, leginto de dekoj da gvidlibroj. La ĉeestantoj de la prelegoj same ricevas informojn pri nekutima lando (ekz. en Francio ni akceptis Kirgizon, Dagestananon, Nepalanon k.s.).


„*Se oni deziras disvolvi tolereman spiriton, necesas koni la kulturon de siaj najbaroj*”, skribas Ljudmila Ulickaja, nuntempa rusa verkistino. Toleremo estas la ŝlosila vorto por akcepti la aliajn, kaj ŝi prave atentigas pri la rolo de kulturo.

### 3. Kiel eligi Esperanton el sia sekreta vivo?

Iam Humphrey Tonkin diris, ke Esperanto estas miraklo de komunikado, sed bedaŭrinde, ni estas la solaj, kiuj scias pri la miraklo. La samon mi emus diri pri Kultura Diverseco.

**3.1** Vivigi kulture diversecon en Esperanto: ni havas la ilojn por tio: ni povas

- aĉeti kaj legi librojn en Esperanto, ĉefe ĝuste tiujn el nekonataj literaturoj,
- traduki la ĉefajn verkojn aŭ la nuntempajn: do ek, ĉefe se via lingvo estas „minoritata” (ne forgesu, ke Frédéric Mistral ricevis la Nobel-premion pri literaturo, kvankam li skribas en la provenca, do regiona lingvo),
- traduki Esperanto-verkojn en naciajn lingvojn. Problemo estos trovi eldonanton kaj distribuanton, sed valoras la penon.





### 3.2 Iĝi modelo akceptante diferencojn

– komprenigi, ke neniu, neniam, nenies kulturo superas kaj ke necesas „*protekti la diversajn formojn de kultura esprimiĝo*”, laŭ la mesaĝo de Audrey Azoulay,

– interŝanĝi samnivele; egalrajte anstataŭ lasi unu kulturon premi la aliajn,

– diskonigi niajn valorojn. Sed ĉu estas inter ni landaj bloguloj-influantoj, laŭ la nuna modo, kiam ĉiuj pretas sekvi iun, kiu enscenigas sian vivon?

„*Politiko kaj kulturo najbaras*” deklaris Ljudmila Ulickaja en la eldonejo *Skemo*

por adoleskantoj (pardonu, ke mi citas Ulickaja, sed mi estis leganta ŝian libron, kiam mi preparis ĉi tiun prelegon).



3.3 Ne resti neŭtralaj pri problemoj, kiuj tuŝas niajn valorojn. Mi ne povas eskapi la nunan problemon de migrantoj. Ulickaja diferencigas inter „migrantoj” (kiuj migras de lando al lando por elekti ĉu la plej bonan, ĉu la plej gasteman), „elmigrintoj”, kiuj decidis migri el sia lando pro ekonomiaj aŭ sociaj problemoj, kaj „ekzilitoj”, kiuj forlasas sian landon intence, sed kun la deziro reveni. Kiam ekzistis muro en Berlino, en la mondo ekzistis 7 muroj; nun forfalas la muro en Berlino, sed estas en la mondo 70 muroj ekzistantaj aŭ konstruataj, sen paroli pri la planitaj! Ĉiuj timas estis „inviditaj” de fremduloj kaj perdi sian identecon kaj kulturon.

Kaj ni vagas inter du fluoj kaj pro tio, mi elektis virinan kaptukon. En UNESKO, en decembro 2017, Estonio prezentis ekspozicion pri „Virinaj kaptukoj en la Soto-regiono”, kiu pravigas la eldiron de la Ĝenerala Direktorino pri la „*neceso protekti la diversajn formojn de kultura esprimiĝo – lingvojn, artojn, metiojn, vivstilojn - precipe tiujn de minoritataj formoj, tiel, ke ili ne forviŝiĝu fare de normiga movado, kiu akompanas tutmondiĝon*” (28.05.2018).

Se ni akceptas estonajn kaptukojn, kial ne akcepti arabajn? Ĉu pro rasismo, pro timo, pro suspekto, ke tiu „minoritato” iĝos „normo”? Pro la subkompreno, ke migranto, kiu alvenis kun sia propra kulturo, devos asimiliĝi aŭ integriĝi? Forgesi aŭ konservi siajn kulturajn trajtojn?

## 4. Konkludo

Mi konkludas denove per frazo de Ulickaja „*Spite la diferencojn en la ekstera aspekto kaj la kulturajn diferencojn, la aliaj finfine ne estas*

*diferencaĵ kompare kun ni*”. Nenion alian celis Zamenhof en la kongreso de Bulonjo ĉe Maro, kiam li diras, ke renkontiĝas „homo kun homo”. Ni, esperantistoj estas avangardistoj rilate interkulturon, ĉar ni kontaktis ĝin kaj aliris alitipan kulturon sen antaŭjuĝo pri la supereco de nia propra kulturo. Post unu jarcento ni plu portu tiun noblan ideon ekster niajn randojn.

---

Renée TRIOLLE estis profesia instruistino de la rusa lingvo en francaj superaj lernejoj. Ŝi konatiĝis kun Esperanto, kiam ŝi estis 17-jara kaj de tiam okupis diversajn postenojn, regionajn, naciajn kaj internaciajn: ŝi estis la unua virina vic-prezidanto de UEA pri kulturo. Ŝi daŭre prelegas, organizas ekspoziciojn aŭ staĝojn, instruas, verkas lernolibrojn. Ŝi estas la Direktoro de la ekzamenoj de Franca Esperanto-Instituto kaj ĉefrepresentanto de UEA ĉe UNESKO.

---



## Profesorino Ilona Koutny ricevis en 2018 la FAME-kulturpremion

Kun ĝojo ni informas vin, ke la 20an de oktobro 2018, profesorino Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj en Poznano, ricevis prestiĝan premion en la germana urbo Aalen.



La FAME-premion oni aljuĝas por distingi personojn aŭ organizojn, kies plujara engaĝo antaŭenigis internacian kompreniĝon.

La transdono de la kulturpremio de la FAME-fondaĵo kaj la urbo Aalen okazis kadre de granda kaj solena festo en la urbodomo de Aalen. En la ĉeesto de ĉ. sepdeko da gastoj, esperantistoj, alvenintaj el diversaj partoj de Germanio kaj kelkaj el aliaj landoj, la premion transdonis al Ilona la urbestro Thilo Rentschler kaj la prezidanto de la FAME-Fondaĵo Andreas Emmerich. La laŭdparoladon faris Peter Zilvar el Herzberg. La feston ĉeestis, kvazaŭ atestante pri la fruktodona laboro de sinjorino Koutny, pluraj iamaj germanaj studentoj en la interlingvistika fako. La inda festo estis impona manifestiĝo de Esperanto; la urbestro en sia parolado kun kontento menciis, ke la urbo kun sia Esperanto-librokolekto de pli ol dudekmil eroj en la urba biblioteko kaj pere de la kulturpremio kun ĝojo kontribuas al la idealo de Esperanto.



Estis interesa faktoro, ke antaŭ du jaroj Katalin Kováts, la redaktoro de la paĝaro [www.edukado.net](http://www.edukado.net), ricevis la saman premion, kaj ŝi estis ankaŭ nun invitita de la urbo por kunfesti, kunesti kun Ilona kaj povis publike gratuli la premiiton en la nomo de [edukado.net](http://edukado.net), ESF, la Esperanto-instruistoj de la tuta

mondo, kaj speciale en la nomo de la studentoj kaj kolegoj de la Interlingvistikaj Studoj en Poznano.

Dum la pli ol unuhora programo paroladoj, laŭdadoj kaj dank- kaj gratulvortoj estis kunligitaj per akordeona koncerto de juna talenta muzikisto. La feston sekvis bufeda akcepto, kie dum horo povis konversacii la ĉeestantoj kun Ilona kaj unu kun la aliaj. La vesperon finis bonetosa komuna vespermanĝo en itala restoracio, kie la lokaj esperantistoj regule kunvenas jam de jardekoj.

Korajn gratulojn al la organizantoj de la festo, al la lokaj esperantistoj kaj ĉefe al Utho Maier, kiuj kun granda atento prizorgis la gastigadon, montris la urbon kaj, ne laste, la faman Esperanto-bibliotekon de Aalen, kie kaj Ilona kaj Katalin povis laŭplaĉe elekti librojn el la duoblaĵoj. Ilona kunportis hejmen stokon por la uzo en la Interlingvistikaj Studoj, dum Katalin trovis plurajn valorajn donacojn por la geonkloj de *Ekparolu!* kaj la sukcesaj ludantoj de RISKO.

Pli detale legi pri la agado de profesorino Koutny kaj gratuli ŝin eblas en la Panteono: <https://edukado.net/biblioteko/panteono>

*Fonto: <https://edukado.net/novajhoj?id=765>*

## Madrido – ILEI-kongreso – 2018-07

### Kultura heredaĵo de Esperanto

#### Enkonduka prelego de Mireille GROSJEAN (Svislando)

Kio estas **kulturo**? Parolante pri kulturo ni tuj mencias nian vastan literaturon, tradukitan kaj originalan, niajn kantojn, niajn reproduktaĵojn. Se ni iras al la antikva-greka difino de artoj, kiu regas en Eŭropo ekde la Renesanco, ni trovas ses artojn: arkitekturo, skulptado, muziko, dancado, literaturo, poezio; tamen tiu listo estas eŭropdevena. Nuntempe oni ofte konsideras kiel arton la tradukadon, la literaturan ĝenron bildstrioj, kaj ankaŭ kinarton. En aliaj kontinentoj kaj depende de la vidpunkto oni povas konsideri kulturon kaj artojn diversmaniere. Ĉiuj samopinias, ke temas **pri homa kreaĵo, kiu celas belecon kaj vekas emocion.**

Pri la **signifo de kulturo** UNESKO asertas: „En plej larĝa senco kulturo povas nuntempe esti konsiderata kiel la tuto de la distingaj trajtoj, spiritaj,

materiaj, intelektaj kaj afekciaj, kiuj karakterizas socion aŭ socian grupon. Ĝi grupigas ne nur artojn, literaturon kaj sciencojn, sed ankaŭ la vivmanierojn, leĝojn, valorsistemojn, tradiciojn kaj kredojn.”

Laŭ Michel Tournier, franca filozofa: „La unua instruo de kulturo estas, ke la mondo estas vasta, la pasinteco estas nekonebla, kaj ke miliardoj da homoj pensas kaj pensis alimaniere ol ni, niaj najbaroj, niaj samlandanoj. Kulturo gvidas al universaleco kaj al skeptikemo. Per klopodoj larĝigi siajn ideojn ĝis universala dimensio, la lerta homo komencas konsideri sian propran civilizon kiel apartan kazon. Li komencas opinii, ke ne ekzistas *LA civilizo, kaj ekster ĝi sovaĝeco*, sed granda nombro da civilizoj, kiuj ĉiuj rajtas esti respektataj.”

Guy Rocher, kebeka filozofa, priskribas kulturon jene: „Tuto ligita, konsistanta el pensmanieroj, sentmanieroj kaj agmanieroj pli aŭ malpli formalaj; ili estas propraĵo de granda kvanto da homoj; ili utilas por fari el tiu homamaso grupon apartan kaj specialan.”

Abd al Malik, franca repisto afrikdevena, asertas: „Kulturo estas tio, kio ligas nin, kio kunligas nin. Pozitivaj estas interŝanĝoj pri kulturoj.”

Laŭ la anglalingva leksikono pri moderna sociologio, kulturo konsistas el **valoroj, normoj, institucioj kaj objektoj kreitaj de homoj.**

La ĉi-jara festa mesaĝo pri la Tago de kultura diverseco por dialogo kaj evoluo de **Audrey Azoulay, Ĝenerala Direktoro de UNESKO**, emfazas „la neceson protekti la diversajn formojn de kultura esprimiĝo, lingvojn, artojn, metiojn, vivstilojn; precipe tiujn de minoritataj popoloj, tiel ke ili ne forviŝiĝu pro la normiga movado, kiu akompanas tutmondiĝon.” Ŝi citas la vortojn de Mahatma **Gandhi**: „Mi ne deziras, ke mia domo estu murigita je ĉiuj flankoj, nek ke la fenestroj estu ŝtopitaj. Mi deziras, ke la kulturo de ĉiuj landoj estu disblovita tra mia domo kiel eble plej libere.” Pro tio, s-ino Azoulay sugestas, „kulturo ne estas heredaĵo ŝtone fiksita, sed heredaĵo vivanta kaj spiranta, malferma al influoj kaj dialogo, ebliganta al ni adaptiĝi pli pace al la mondaj ŝanĝiĝoj.”

Plie UNESKO tiel difinis la **nemateriajn heredaĵojn protektendajn**: Mi citas: „Tiu nemateria kultura heredaĵo, kiu transiras de generacio al generacio, estas konstante nove rekreatata fare de la homgrupoj en rilato kun ilia vivmedio, ilia interago kun la naturo kaj ilia historio. Tio donas al ili identecan senton kaj senton de kontinueco, kaj kontribuas al grandiĝo de respekto al la kultura diverseco kaj la homa kreemo.”

Kiam ILEI lanĉis konkurson por la kreo de la **kongresa emblemo**, ĝi ricevis proksimume 50 proponojn. En 30 el ili vidiĝis virbovo. Do jen la unua ideo pri Hispanio en la menso de homoj el diversaj mondopartoj. Niaj hispanaj kolegoj malkontentis. Hispanio ne reduktiĝas al taŭrobatalo! Parizo ne reduktiĝas al la Eiffel-turo. Londono ne reduktiĝas al la Turo-Ponto. Svislando ne reduktiĝas al horloĝoj kaj bankoj. Tio estas stereotipoj. Ili estas simplaj, tre simplaj. La realo estas riĉa kaj kompleksa. Homoj ŝatas simplajn prezentojn, sed la mondo ne estas simpla. Ni devas konsciiĝi, ke tio estas stereotipoj kaj lukti kontraŭ ili. En la metodo, kiun mi devis uzi por instrui la germanan, aperis jenaj frazoj: ruso trinkas vodkon – franco trinkas vinon – germano trinkas bieron – brito trinkas teon – japano trinkas sakeon.... Estis tre agrabla maniero por la aŭtoro de la ekzerco prezenti la nomojn de la naciecoj. Tamen tia disvastigo de stereotipoj en instruado estas nepre evitenda.

Kulturo estas prezentata kiel **la malo de naturo**. Kreskanta arbo estas natura fenomeno. Akvo fluanta suben estas natura fenomeno. Korbo naskiĝas per plektado de sekigitaj folioj fare de manlaboristo, tio estas kulturo. Pro tio mi neniam parolas pri naturaj lingvoj, ĉar lingvoj estas kreaĵo de homoj. Lingvoj estas kultura fenomeno. Nia lingvo naskiĝis en la cerbo de genia adoleskanto, kelkaj diras, ke ĝi estas artefarita. Bone. Sed la aliajn lingvojn oni ne povas nomi „naturaj”, ĉar ili estas kulturaj fenomenoj. Ili rilatas al etno, do ni nomu ilin „etnaj lingvoj”, kiel la hispana, la portugala, la ĉina, la japana, la urdua ktp. Ekzistas lingvaj leĝoj, kiuj efikas sur la evoluon de iuj lingvoj, la vivon de la lingvoj, ĉar la lingvoj vivas. Tre interese estas, ke ankaŭ nia lingvo obeas al tia lingva evoluo tute nature. Tio pruvas ĝian vivkapablon kaj evolukapablon. Per tiaj konsideroj oni povas konvinki lingvistojn pri nia lingvo. Se iu kontraŭulo substrekas, ke Esperanto estas artefarita lingvo, la itala profesoro Furio Gabrieli el la universitato de Ĝenevo respondis: same aŭtoj estas artefaritaj; kiu venis hodiaŭ per ĉevalo? Same medikamentoj estas artefaritaj, kiel antibiotikoj; ĉu vi pro tio evitus doni ilin al via malsana infano? Certe ne. Tiaj klarigoj povas helpi al vi, se vi parolas pri Esperanto kun ne informitaj homoj.

**Etno estas homgrupo kun teritorio kaj lingvo.** Etno havas sian kulturon; povas esti festivaloj, folklorajoj, manlaboroj, artoj, kutimoj kaj lingvo. Pri mia landeto Svislando, mi dirus, ke tie vivas diversaj etnoj. En ĉiu etno estas diversaj triboj kaj klanoj. Estas franĉparola etno en Romandio, diversaj triboj kun ĝermanecaj dialektoj, alia etno parolas la italan.... Do ne ekzistas svisa

etno. Tio estas analizo de la svisa situacio per vortoj, kiujn oni kutimas uzi por Afriko. Amuza maniero, ĉu ne?

Ni venu al grava koncepto: **Diasporo**. Diasporo estas grekdevena vorto, kies signifo estas popolo, etno, dissemita tra la mondo. Pro tio ni bone povas diri, ke Esperantio estas diasporo. Esperantujo estas etno sen teritorio, sed kun lingvo. Famaj diasporoj estas judoj, armenoj, ciganoj. Okaze de kongresoj naskiĝas teritorio nia. Ni ĝuu nian etnan vivon!

Kio estas nia kulturo? Kia estas nia kulturo? Feliĉe ni havas nun plenan semajnon por diskuti pri tio. La kulturo de Esperanto estas ne nur literaturo kaj kantoj, sed ankaŭ respekto, solidareco, toleremo, homaranismo. Tio estas forta sento, ke ni apartenas al granda homa familio.

En nia kulturo kuŝas la virto **SOLIDARECO**. Tiuj, kiuj lernis Esperanton kaj uzas ĝin, sentas sin membroj de tutmonda homa familio. El tio fontas la emo helpi al aliaj esperantistoj. Se vi esploras pri diversaj programoj por helpi alilandajn esperantistojn, vi trovos ekzemple la programon Esperanto Plus. Ĝi estis lanĉita de Sinjoro Jean-Pierre Marcq el Francio. Sinjoro Marcq sukcesis arigi dekon da esperantistoj, kiuj pretas mondonaci ĉiun monaton dek eŭrojn aŭ dudek por unu persono en Afriko. Tiu samideano akiras regulan subtenon kaj per ĝi li sukcesas vivteni sin, informi pri Esperanto kaj instrui nian lingvon. Tiu programo plu floris arigante novan subtenan grupon por helpi al plia persono en Madagaskaro. Poste sekvis Tanzanio kaj DR Kongo. La movado havas do solidajn pilierojn en tiuj afrikaj landoj. La programo estas efika kaj serioza, la samideanoj en Afriko regule raportas pri sia agado en tre proksima kontakto kun Sinjoro Marcq kaj lia asocio. Alia interesa programo estas la konstruado de putoj en Tanzanio lanĉita de inĝeniero Manfred Westermayer el Germanio, kiu sukcesis arigi monan subtenon de neesperantistaj germanaj inĝenieroj. Aldoniĝas multaj individuaj helpoj, pri kiuj mi ne scias; mi nur scias, ke multaj esperantistoj el la Nordo helpas al Suduloj. Tia interhelpo faris, ke ĵurnalisto foje diris al mi: *fakte Esperanto estas Rotary-klubo por modestaj homoj*, sciante, ke Rotary-kluboj estas elitismaj.

Alia virto en nia movado, en nia kulturo, estas **TOLEREMO**. Nia komuna lingvo ebligas al ni rilati kun homoj el aliaj mondopartoj, el aliaj kulturoj. Kompreneble ni havas niajn piedojn en nia kulturo, ni ekzistas per ĝi, ni havas ĝin en nia koro, sub nia haŭto ĝisoste. Tamen ni povas ekrilati kun aliaj homoj kaj ekkoni iliajn kulturojn. Farante tion, ni konsciiĝas, ke la aliulo same enradikiĝas en sia kulturo kaj havas tiun rajton, do ke neniu

kulturo pli valoras ol alia kulturo, ke ni estas ĉiuj malsamaj sed egalrajtaj. Tia toleremo estas kerno de nia kulturo, aŭ devus esti. „*Ĉiuj malsamaj ĉiuj egalrajtaj*” estas slogano de la Konsilio de Eŭropo. En tiu ĉi jaro 2018 ni sekvas la proponon de Eŭropo, ke la Jaro estu dediĉita al KULTURO.

Nia kongresa temo estas: nia kultura heredaĵo. Do venas la ideo **heredi**. Heredi estas ricevi de niaj prauloj. Ni ricevis belajn poemojn de Zamenhof, ni ricevis la verkon *la infana raso* de William Auld. Ni heredis multon de la miloj da esperantistoj, kiuj aktivis kaj ion produktis ekde 1887. Heredaĵo estas io valora. Oni mencias ĝin en iu testamento. Heredaĵo ne estas io forĵetebla, forĵetinda. Heredaĵo estas io valora, kara, savenda. Heredaĵon kutime oni transdonas al la idoj, do ĝi trairas la generaciojn. Ĝi efikas kiel gvidfadeno en iu familio, en iu popolo. Tiel zorgeme ni devas trakti nian denaskan kulturon kaj nian Esperanto-kulturon.

Nia esperanta kulturo **aldoniĝas al nia denaska kulturo**, niaj denaskaj kulturoj. Al niaj etnaj kulturoj. Lernante Esperanton, ni ne forgesas niajn denaskajn lingvojn. Kelkaj timemaj homoj venas al jena pripensio: Parolante Esperanton, mi iom malfidelas al mia patrolando. Tamen iu persono povas tute bone kaj ami sian denaskan regionon kaj kulturon, kaj koni kaj respekti ĉiujn samideanojn en la tuta mondo. Mi konstatas, ke estas longa vojo inter la strikta fideleco al sia patrolando kaj la tutmonda pensmaniero malfermita. Temas pri evoluo, la pensmaniero ŝanĝiĝas tra la monatoj kaj jaroj. En la deknaŭa jarcento naskiĝis la nocio de naci-ŝtato, kiu klopodis alporti politikan solvon, sed fakte kreas problemojn. Ĝi konstruas kadrojn en nia pensmaniero, kiuj limigas nian mondvidon.

En Francio vivas francoj; en Japanio vivas japanoj, en Rusio vivas rusoj... Tio ne taŭgas. Vidu la sloganon de SAT: SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo! Kompreneble ni estas kaj restas ligitaj al nia naskiĝloko. Tio estas tute normala fenomeno. La naturo, kiun ni malkovris estante infano, restas en nia koro. Temas pri forta ligo. Vojaĝante ni malkovras aliajn mondopartojn, aliajn homojn, kiuj same ligiĝas al sia loĝloko. Feriante en Nederlando, mi timis, kiam mi restadis en loko pli suba ol la oceano. Nederlandanoj feris en la Alpoj kaj timis, ke la montoj falos sur ili; tuj ili reiris al sia lando... Ni ne elektas la lokon, kie ni naskiĝas. Sed tute certe ni ligiĝas al tiu loko. Mi certas, ke ĉiu homo deziras vivi kaj morti tie, kie li aŭ ŝi naskiĝis. Pro tio mi certas, ke elmigrintoj elmigras nur, kiam la vivo fariĝas ne ebla en ilia regiono. Mi vidis plaĝon en Benino, en Ouidah, kie la sklavoĵo devis enŝipiĝi por iri al Ameriko: perforta ellandigo okazis.



Kelkaj ĵetis sin surteren kaj manĝis sablon por morti tuj surloke. Terura sinmortigo, por morti en la naskiĝlando.

Mi emfazas la ligan al sia denaska regiono kaj kulturo. Tamen ekzistas **dukulturaj** homoj, same kiel ekzistas dulingvaj homoj; temas pri personoj, kiuj sukcesas eniri alian kulturon tre tre profunde kaj komplete. Jen tri ekzemploj:

Mi ofte diskutis per skajpo kun vjetnama amiko, **Nguyen Thu**, altnivela samideano, kiu organizis la hanojan UK-on en 2012 kaj bedaŭrinde forpasis. Foje dum diskuto li petis: „ĉu ni povus dum kelkaj minutoj paroli france?” Mi jesis, kaj povis konstati, ke li parolas la francan kiel denaskulo. Fakto estas, ke li studis en periodo, kiam Vjetnamio estis kolonio de Francio. Do dum jaroj li uzis la francan por lertiĝi kaj labori. Li estis dulingvulo kaj dukulturulo.

Same mi volas mencii niajn koleginojn **Maria Butan** kaj **Mariana Pitar** el Rumanio. En tiu lando la franca estis kultura lingvo kaj ili lernis la lingvon kaj la kulturon je tre alta nivelo, mi devas vere admiri iliajn kapablojn.

Ĉe tiuj du personoj mi povas konsciiĝi pri ilia nivelo pro la fakto, ke la franca estas mia lingvo. Certe ekzistas aliaj tiaj dukulturuloj, kies kapablojn mi ne povas mem taksi. Tie mi volas mencii **Duncan Charters**, kiu intimiĝis kun la hispana kulturo abunde kaj profunde.

Gravas, ke en ĉiuj mondopartoj ni **flegu nian denaskan kulturon**, ni sciu pri ĝi, ni diskonigu, ke ĝi ekzistas. Gravas, ke la gepatroj kaj geavoj informu la infanojn, la idojn. Nuntempe ekzistas danĝero pro la invado de la angla lingvo. La danĝero estas ekstreme granda pro la fakto, ke tiu lingvo havas je dispono teknikajn ilojn, kiuj ne ekzistis en la pasinteco. Do ĝi disvastiĝas tutmonde kaj forte. Ni devas koni kaj flegi niajn lokajn kulturaĵojn.

Kompreneble esperantistoj devas same **flegi la Esperanto-kulturon**; ili unue pensas pri la originala literaturo en Esperanto, niaj kantoj, niaj poezioj, niaj infanlibroj. Plie la internacia lingvo Esperanto ebligas aliron al multaj literaturaj verkoj el la tuta mondo, do pordoj malfermiĝas per ĝia uzo. Plie nia kulturo estas nia sento aparteni al tutmonda familio, estas nia respekto al ĉiuj aliaj kulturoj, solidareco kaj toleremo.

Kia estas la **rolo de instruistoj** en tiu pripenso? Ĉu ni instruistoj devas prezenti nian kulturon al niaj gestudentoj? Ĉu tiu tasko estas eblo aŭ devo? Certe ni devas instrui la lingvon, tiel ke niaj studentoj kapablu uzi ĝin kaj fari ion per ĝi. Nia lingvo estas ilo. Aŭtovendisto vendas al vi ilon. La vendisto

ne diras al vi, kien vi iru per via veturilo. Mi konas EO-instruiston, kiu instruas nur la lingvon, kaj rifuzas prezenti la literaturon kaj menciigi la movadon, la kongresojn... Ni devos diskuti pri tio. Ni havas plenan semajnon por fari tion.

Permesu al mi ankoraŭ prezenti etan ĉapitron. En nia Movado ekzistas **ekzamenoj**. Ekzistas eĉ du tipoj de ekzamenoj. Ekzistas KER-ekzamenoj kaj ekzamenoj de ILEI/UEA. La pli malnovaj sed ankoraŭ uzataj estas la ekzamenoj de ILEI/UEA, temas pri movadaj ekzamenoj. Movadaj, ĉar kreitaj en la movado, de niaj du gravaj institucioj UEA kaj ILEI. Movadaj, ĉar agnoskitaj en nia Movado. Iu lernejestro povas sed ne devas agnoski ilin. En tiu tipo de ekzamenoj oni testas la kulturajn konojn de la kandidato, tio estas la konoj pri nia kulturo kaj nia movado.

La aliaj ekzamenoj nomiĝas KER. Tio signifas Komuna Eŭropa Referenckadro. Kial eŭropa, kiam nia lingvo estas tutmonde uzata? Tiu KER-sistemo estas tiom bona, trafa, adekvata por taksii lingvokapablojn, ke en ĝi oni trovas ankaŭ la araban, la ĉinan, la japanan, la korean. Do ĝi daŭre nomiĝas eŭropa, sed ne plu estas nur eŭropa. Do Esperanto povas stari en tia abunda kaj varia lingvolisto. En la KER-ekzamenoj oni NE esploras la kulturajn konojn de la kandidato; oni esploras kaj taksas nur la lingvajn kapablojn, la komprenon, la paroladon, la skribadon. Povas sukcesi iu Esperanto-parolanto, kiu ne konas la nomon de Zamenhof....

Pro tio ILEI planas la aldonon de nova ekzamentipo, kiu nomiĝos KOMO. KO por Kulturaj konoj kaj MO por Movadaj konoj. Tiel fervoraj esperantistoj povos akiri KER-diplomojn pri siaj lingvokapabloj kaj ekzameniĝi ĉe ILEI pri siaj kulturaj kaj movadaj konoj.

Nia kongresa semajno arigis multajn partoprenantojn, kiujn mi bonvenigas elkore. Tiu bunteco ebligis ideointerŝanĝojn, kiuj tutcerte estos fruktodonaj. Ni preparis buntan programon kaj plie scias, ke ankaŭ la koridoraj kontaktoj estos buntaj kaj valoraj. Certe ĉiu el vi havos la okazon prezenti sian kulturon, klarigi pri ĝi, kaj ekscios pri aliaj kulturoj. Kaj ni ĉiuj ekscios multon pri la hispana kulturo, pri la kulturo de nia gastiganta lando. Mi deziras al vi agrablan semajnon en Madrido.

Mi dankas pro via atento.

## Solenaĵoj

de WEI Yubin „Jado” (Ĉinio)

**Noto de Mireille GROSJEAN:** *En solenaj momentoj ni gvidantoj devas trovi solenajn vortojn, solenajn frazojn, kuraĝigajn parolojn. Ĉar en tiaj momentoj neniu interrompos nin, ni povas tiam esprimi bondezirojn, deklari pozitivajn rezultojn, montri la vojon, sugesti laboregon, eble eĉ fari kritikojn aŭ diri iom da riproĉoj, admonoj, skoldadoj. Ĉi-sube venas du tre kuraĝigaj tekstoj de S-ro WEI Yubin „Jado”, kiu estas lernejestro kaj havas en gravaj momentoj la eblon alparoli ĉiujn instruistojn kaj ĉiujn lernantojn kune. Imagu la homamason!*



### **El retmesaĝo de Jado, nia ĉina sekciestro:**

Nia lernejo estas en la urbo Taiyuan, Shanxi provinco, centra Ĉinio. Nun en nia lernejo estas 1400 lernejanoj. En 2008 ni enkondukis Esperanton en nian lernejon, ĝis nun jam pasis dek jaroj. Esperanto vigligis la etoson de la lernejo, formis la specialan trajton de la lernejo diference de la aliaj. Lastatempe preskaŭ ĉiujare ni akceptas esperantistojn fremdlandajn, kio

famigis nian lernejon. En nia regiono multaj homoj eksciis pri Esperanto pro tio, ke iliaj infanoj kaj nepoj, parencoj kaj amikoj lernas en la Elementa Lernejo Baiyangshujie. Laŭ mi, estas tre bona afero por nia movado la fakto, ke eĉ se ili ne havas tempon lerni nian lingvon, ili eksciis, ke en la mondo ekzistas la neŭtrala lingvo Esperanto, kiu vivas kaj utilas.

## **Parolo en la inaŭguro de 2-a Esperanto-Semajno de Elementa Lernejo Baiyangshujie**

*Estimataj instruistoj, karaj lernantoj:*

Saluton! Hodiaŭ estas la 15-a de decembro 2014. Antaŭ 155 jaroj, iu saĝulo naskiĝis en la urbeto Bjalistoko de orienta Pollando. Post 28 jaroj li publikigis la *Unuan libron* en Eo sub la pseŭdonimo de „Doktoro Esperanto”. Ekde tiam la lingvo kun bela idealo kaj sento de la homaro venis en la mondon. Ĝia aŭtoro, D-ro Zamenhof, tiam skribis kun granda emocio:

*Ne al glavo sangon soifanta*

*Ĝi la homan tiras familion:*

*Al la mond' eterne militanta*

*Ĝi promesas sanktan harmonion.*

Tiu lingvo, per flugiloj de facila vento, flugis al ĉiuj lokoj de la mondo, ankaŭ en la korojn de la homaro.

Post kiam Zamenhof forpasis, por memori lian kontribuadon al la homa paco kaj interkompreniĝo, ĉiujare oni celebras la 15an de decembro kiel feston de esperantistoj – la Zamenhofan Tagon. Ĝuste en tiu ĉi tago ĉi-jare malfermiĝis la 2-a Eo-Semajno de Elementa Lernejo de la Strato Baiyangshu. La agado estas ne nur omaĝo al Zamenhof, sed ankaŭ praktiko de lia ideo kaj apliko de lia lingvo.

Mi esperas, ke vi ĉiuj aktive partoprenos en la aktivadon. Vi certe ion gajnos, aŭ en scio, aŭ en ideoj, aŭ en apliko de nia lingvo. Vi ĉiuj povos ion lerni, se vi deziras, kaj havos ian progreson. Al la infanoj, kiuj ŝatas Esperanton, mi volas diri: kiu volas, tiu povas, kaj kun persista lernado, vi sendube sukcesos. Kaj ankaŭ al la aliaj infanoj, kiuj ankoraŭ dubas pri la utileco de Esperanto, mi volas diri laŭ miaj propraj spertoj, ke Esperanto estas ne nur bela idealo por atingi la harmonian mondon, sed ankaŭ estas scienca, facila kaj utila lingvo. Posedante ĝin, vi povas trovi amikojn en la tuta mondo.

En oktobro ĉi-jare, mi estis invitita de sinjorino Isikava Tiekō, prezidantino de la japana sekcio de ILEI, kaj partoprenis en la 4-a internacia seminario de Orienta Azio. Dum la restado de 14 tagoj, multaj japanaj

esperantistoj min helpis, kaj mi neniam sentis min soleca. Mi egale kaj libere interparolis kun eksterlandaj amikoj pri eduka scienco, kio multe ĝuigas min.

Nia aktivado ricevis gratulojn de pli ol 20 organizoj kaj personoj el diversaj landoj. Tio neniam okazus en aliaj elementaj lernejoj de provincaj urboj. Ĉu ĉio ĉi ne sufiĉas pruvi la utilecon de nia lingvo? Avino Bingxin, fama verkistino de moderna infanliteraturo, diris: „Kiu konas Esperanton, tiu konas la mondon”. Ni prenu la spiriton de ĉi-foja Eo-semajno „egaleco, amikeco, plurisma kunekzisto”, spertu Eo-kulturon kaj ĝin alproksimigu. Kaj pere de tio ni des pli atentu la abundajn kaj plurismajn kulturojn de la mondo. Mi deziras, ke vi havu novan trovon kaj pensmanieron en la aktivado por bone koni vin mem kaj la mondon.

Fine mi deziras plenan sukceson al la 2-a Eo-Semajno de Elementa-Lernejo de la Strato Baiyangshu.



### **3) Parolo en la ferma ceremonio de la 2-a Esperanto-semajno de Elementa Lernejo de Baiyangshu-strato**

*Karaj gelernantoj, karaj geïnstruistoj:*

Saluton! Hodiaŭ, la 2-a Esperanto-semajno de Elementa Lernejo de Baiyangshu-strato skribos sian sukcesan punkton. En la mallonga tempo de la semajno, gelernantoj aktive partoprenis en la aktivadon, ĉu per verkoj, ĉu

per desegnaĵoj, ĉu per retumo, ĉu per prezento de programeroj, ĉu ankaŭ per partopreno en nedevigaj kursoj. El viaj belaj artikoloj kun klara stilo, el viaj gajaj kaj elegantaj pentraĵoj, el viaj bone redaktitaj manskribĵurnaloj, kaj ankaŭ el viaj radiantaj vizaĝoj vidiĝis viaj scivolemo kaj seriozeco. Per konkreta agado vi spertas, esploras, studas kaj komprenigas la ĉeftemon de nia aktivado, „Egaleco, Amikeco, Plurisma kunekzisto”, kaj ĝuis la plezuron ke *mi partoprenas; mi ĝuas plezuron; kaj mi progresas*, kio estos signifplena preparo por ekvelo al estonteco en via vivo.

Kompare kun la pasinta Esperanto-semajno, la ĉi-foja aktivado havas apartajn trajtojn: Unue, la aktivado estas vaste atentigita, ĉar pli ol 20 organizoj kaj personoj el diversaj landoj sendis gratulleteron; due, la aktivado estas sufiĉe preparita. Ni plifruigis la aranĝon monate, kaj la propagandon semajne, pro tio ke la aktivado havas altan kvaliton kaj ricevis bonan efikon; trie, la aktivado formiĝis per diversaj manieroj, kaj havas multajn partoprenantojn. Ni okazigis prelegojn, konkursojn de verkado kaj pentrado ktp. Multaj gepatroj partoprenis en la aktivado kvankam ili estas okupitaj pro laboro kaj hejma mastrumado; kvare, la propaganda raporto estas ĝisdata.

En la sekvanta tago, post la malfermo de la aktivado, la *Taggazeto Shanxi* ĝin raportis per foto kaj teksto. Ĝis nun, la aktivado jam estis raportita de diversaj raportaĵoj per apartaj formoj kaj lingvoj, inkluzive de *El Popola Ĉinio*, *Ĵurnalo de Moderna Eduko*, *Matena Ĵurnalo pri Vivo*, *Reta Ĵurnalo de Novaĵo de Shanxi*, *Reta Ĵurnalo de Novaĵo de Taiyuan*, ankaŭ de la reto *Edukado.net* ktp.

Laste, la interna ideo de Esperanto estas pli vaste komprenata de la partoprenantoj. La aktivado al ni komprenigis, ke Esperanto ne nur estas lingvo, ĝi ankoraŭ estas bela idealo de la homaro, metodo kaj pensmaniero por solvi internaciajn problemojn. Ĉio ĉi ja estas nia celo de la Esperanto-semajno. Mi opinias, ke lernejoj de Elementa Lernejo Baiyangshu ne nur devas havi honestan sintenon, diligentan kvaliton, progreseman spiriton, sed tamen ili devas ankaŭ posedi pli vastan rigardon, kompatan koron por la tuta homaro, kaj la ideojn de egaleco kaj frateco.

La aktivado baldaŭ fermiĝos. Mi esperas, ke vi, lernantoj uzos la scion, kiun vi lernis en la ĉi-foja aktivado en via praktiko, kaj lasos ĝin fariĝi via konstanta kvalito kaj aktiva spirito, daŭre vin kuraĝiganta, por ke via vivo estu pli bela kaj brila.

Nun mi deklaras la sukcesan fermon de la dua Esperanto-semajno de Elementa Lernejo de Baiyangshu-strato.

## Praktika utiligado de la silentaj filmoj de Chaplin II

### Daŭrigo kaj konkludaj komentoj.

*de Dennis KEEFE, Cullera, Hispanio*

En miaj artikoloj pri la utiligado de silentaj filmoj por la praktikigado de Esperanto, mi substrekis, ke tiaj filmoj povas esti uzataj en ĉiaj niveloj kaj de ĉiaj kursgvidantoj. Tio estas, se la lernanto estas komencanto, mezlernanto aŭ altnivela parolanto de Esperanto, tiaj filmoj povas helpi al li aŭ ŝi pli bone alproprigi al si Esperanton. Krome, se la kursgvidanto estas novsperta, mezsperta aŭ tre sperta instruisto, li aŭ ŝi povas sukcese utiligi la filmojn por praktikigi, aŭskultigante kaj paroligante, la gelernantojn.

Kompreneble la enhavo de la leciono kaj la metodoj de la kursgvidantoj ne samas en malsamaj niveloj, kaj ne samas kun malsamspertaj instruistoj. Kiel videblis en la antaŭa artikolo, la vortoj utiligataj dum la leciono vastiĝas laŭ la lingvo-nivelo de la lernanto. Simile, la gramatiko kompleksiĝas, kiam la kurso iras de enhavo por komencanto al enhavo por progresantoj kaj por fluaj parolantoj de la lingvo.

La metodoj de la kursgvidanto ŝanĝiĝas ankaŭ laŭ sperto kaj lia aŭ ŝia edukonivelo pri lingvo-instruado. Novulaj instruantoj, tamen, povas gvidi sufiĉe bonan kurson, spontane starigante simplajn demandojn pri tio, kio okazas en la filmo. Profesiaj instruistoj povas ankaŭ tiel fari, sed pli didaktike, pli efike, pli celstrebe. Krome, la profesia lingvo-instruisto scias, kiel rilatigi la bazan enhavon de la filmo kun kromaj enhavoj ene kaj ekstere de la klasĉambro, ne nur aŭskulte kaj parole, sed ankaŭ lege kaj verke.

Nun en ĉi tiu lasta parto de la artikolo-serio pri la utiligado de silentaj filmoj por paroligi kaj praktikigi kurso-partoprenantojn, mi volas doni detalan ekzemplon de leciona DIALOGO inter la kursgvidanto kaj la gelernantoj. En ĉi tiu nereala, tamen realeca kurso, estas unu sperta kursgvidanto, kaj 12 meznivelaj kaj altnivelaj gelernantoj.

Vi rimarkos, ke estiĝas abundaj demandoj, kaj kelkfoje la respondoj rekte rilatas la demandojn kaj kelkfoje ili iom plivastiĝas tuŝante aliajn temojn. Vi rimarkos ankaŭ, ke la kursgvidanto uzas nur unu parteton de la jam nelonga filmeto, nur 23 sekundojn, kiuj estas siavice dividitaj en du partojn. Se vi tralegas la suban, iom artefaritan dialogon, pensu pri tio, ke ege malmulte da filmo-rigardo povas estiĝi tre longan kaj sufiĉe profundan praktikadon.

Laste, sciuj, ke tia dialogo ne eliĝas el antaŭpreparita materialo. Ne ekzistas skribita listo da demandoj, kiun la kursgvidanto devas sekvi. Tio ne signifas, ke la kursgvidanto ne antaŭpreparas sin, pensante pri eblaj demandoj, kontrolante specifajn vortojn ktp. Tio signifas nur, ke la instruisto devas sekvi la fluon kaj la ritmon de la gelnantoj kaj iliajn reagojn al ĉiu paŝeto, sceneto de la filmo.

Nun, la konkreta ekzemplo, sekvata de edukaj komentoj. Bonvolu rigardi la filmeton unue, speciale la unuajn 23 sekundojn, ĉar la bildo sube ne rilatas tiun komencan parton..

*Filmo: The Immigrant, 1917 (La Enmigrinto).*

*Sceno: Gambling on the Ship (Hazardo-Ludado sur la Ŝipo).*

*Subsceno: Playing Dice (Ludado per Ĵetkuboj)*



*Daŭro: 23 sekundoj.*

*Fonto: <https://www.youtube.com/watch?v=sg6VAJecvVs> (ekde 00:01 ĝis 00:23 el 03:21).*



K = kursgvidanto. L<sub>x</sub> = lernanto 1 ĝis 12 (ekzemple, L<sub>1</sub> estas lernanto 1, kaj L<sub>12</sub> estas lernanto 12). F = Francisko, unu lernanto, kiu poste gvidas la kurson.

(Unue, K, la kursgvidanto, vidigas nur la unuan parteton de la filmo, inter 00:01 kaj 00:15. Tion li eble faros pli ol unufoje, sed ĉiam nur ĝis la sekundo 00:15).

K Ĉu Ĉoĉo nun manĝas?

L<sub>1</sub> Ne, li ne manĝas. Li jam antaŭe manĝis.

K Ĉu li dormas?

L<sub>1,10</sub> Ne, li ne faras tion.

K Kion li faras nun? Ĉu li ludas kartojn, ŝakludon aŭ ĵetkubojn?

L<sub>7</sub> Li ludas ĵetkubojn. Li havas du kubojn en la mano.

K Ĉu li estas sola, aŭ ĉu li ludas kun aliaj?

L<sub>4</sub> Li ludas kun aliaj pasaĝeroj de la ŝipo.

K Ĉu vi pensas, ke Ĉoĉo gajnos aŭ perdos?

L<sub>11</sub> Mi pensas, ke li gajnos. Li ĉiam havas bonan ŝancon.

L<sub>2</sub> Mi ne konsentas kun vi. Mi kredas, ke li perdos! Li ofte havas tre malbonan ŝancon.

L<sub>3</sub> Mi havas alian opinion. Mi pensas, ke li gajnos multe da mono, do li ne plu estos malriĉa kiel nun, kaj poste li geedziĝos kun la bela virino, kiun ni vidis en la unua parto de la filmo.

L<sub>9</sub> Prave. Mi tute konsentas kun vi pri tio. Estas filmo de Holivudo. Probable la filmo havos feliĉan finon.

K Bone. Mi vidas, ke vi ĉiuj havas diversajn opiniojn. Ni voĉdonu: Kiuj el vi opinias, ke Ĉoĉo gajnos la ludon? Levu la manon.

K Kaj kiuj pensas kontraŭe: Ke li perdos?

K Do, kvin el vi opinias, ke li havos sukceson, kaj sep el vi kredas kontraŭe: ke li malsukcesos. Ni rigardu plu. Nun, ni spektu la sekvajn 8 sekundojn de la filmo. Poste vi diros al mi, kio okazis.

(Intertempe, la kursgvidanto montras kelkajn pliajn sekundojn de la filmo kaj haltigas ĝin. Specife nur la sekundojn ĝis 00:23).

K Ho ve! Kio ĵus okazis?

L<sub>5</sub> Ĉoĉo gajnis, sed. . . .

L<sub>8</sub> Sed li certe bedaŭros tion!

K Kio? Kio estas la problemoj?

L<sub>5</sub> Unu el la kunludantoj ne estas kontenta. Li koleras. Li estas furioza. Li batis la tablon kaj preskaŭ rompĝis ĝin.

K Kial li tiom koleras?

L<sub>9</sub> Mi ne scias. Mi ne estas certa. Eble li ne plu havas monon. Eble li perdis ĉion, kion li havas. Se mi estus Ĉoĉo, mi forkurus tuj.

K Priskribu iomete la gajninton, kaj ankaŭ la perdinton.

L<sub>12</sub> Tiu, kiu gajnis, do Ĉoĉo, estas malalta kaj malgranda, kaj havas lipharojn. Mi pensas, ke li estas bonkora, sed iom ruza. Tiu, kiu perdis, estas relative alta, relative dika, verŝajne tre forta, kaj havas barbon. Kaj mi pensas, ke li estas iom stulta, kaj tute ne bonkora. Li certe estas fiulo, kaj eble li estas krimulo!

K Kaj nun, pensu pri tio, kio ĵus okazis, kial vi scias, ke tiu fortulo estas tre kolera?

L<sub>3</sub> Ĉar li preskaŭ rompĝis la tablon. Kaj rigardu lian vizaĝon. Tiu homo tute ne kontentas.

K Bone. Kaj nun, iom detala demando: Ĉu tio estas vera tablo, aŭ ĉu estas iaspeca skatolo?

L<sub>9</sub> Ŝajnas, ke ĝi estas ia skatolo, ia granda skatolo por transporti aĵojn sur ŝipo, ekzemple. Eble ene estas varoj por vendi, aŭ iloj por la ŝipo.

K Bone. Nun, karaj gelernantoj, estas via vico. Francisko, se vi volas, nun vi estas la instruisto. Starigu demandojn al viaj kunlernantoj pri la partoj de la filmo, kiujn ni ĵus spektis. Mi ne plu diros ion ajn. Vi, Francisko, estas la instruisto. Ĉu vi volas?

F Nu, bone, mi provos! Nu, mi ne estas lingvo-instruisto, tamen kiel vi scias, mi instruas historion kaj geografion en la mezlernejo. Karaj gekursanoj! Saluton! En la filmo, ĉu vi rimarkis per kiu mano Ĉoĉo ĵetas la ĵetkubojn?

L<sub>1</sub> Mi tute ne rimarkis. Eble li uzis ambaŭ manojn.

L<sub>12</sub> Mi pensas, ke li faras tion per la maldekstra mano.

F Ĝuste. Sed, ĉu tio signifas, ke li estas maldekstrulo?

L<sub>1</sub> Eble jes, eble ne. Eble li faras ĉion alian per la alia mano: skribas dekstramane, manpremas dekstramane ktp.

L<sub>10</sub> Mi konsentas kun vi pri tio.

F Nu, alia temo nur iomete rilata al la filmo. Ĉi-foje pri vi. Ĉu vi iam ludis ĵetkubojn?

L<sub>5</sub> Mi ne, sed mia frato faris tion.

F Kio okazis?

L<sub>5</sub> Li gajnis 50 eŭrojn. Li havis multe da ŝanco.

F Bone. Nun, kiu povas diri al mi, kio povas okazi poste en la filmo? Divenu la sekvantan parton.

L<sub>6</sub> Mi pensas, ke la barbulo eble frapos Ĉoĉon, sed Ĉoĉo estas tre ruza. Se estos lukto, li gajnos.

L<sub>1</sub> Mi ne kredas tion. Mi pensas, ke ili poste ludos kartojn, ĉar mi vidis antaŭe la tutan filmon.

F Nu, bone. Sed imagu, ke vi NE scias, kio okazos. Ludu iomete. Divenu. Uzu vian fantazion. . . .

K Tre bona laboro, Francisko. Vi estas bona instruanto de Esperanto. Eble venontmonate vi povos gvidi nian kurson. Kaj nun mi vidas, ke nia tempo elĉerpiĝas. Por via hejmtasko ĉi-semajne, bonvolu elekti unu el la sekvaj taskoj. Mi skribos ilin sur la nigra tabulo, jen:

Aŭ Hejmtasko I: Skribu dupaĝan resumon de unu sceno de la filmo La Enmigrinto.

Aŭ Hejmtasko II: Imagu, ke vi devas modernigi tiun filmon. Aliigu ĝin en voĉan filmon. Skribu dialogon de unu sceno. Maksimume 2 paĝoj.

Aŭ Hejmtasko III: Imagu, ke vi estas unu el la ĉefaj rolantoj de la filmo La Enmigrinto. Skribu pri via vivo en la filmo.

K Do, karaj gelernantoj, tio estas ĉio por hodiaŭ. Havu bonan semajnfinojn, kaj ĝis la venonta semajno.

**Komentado:** En ĉi tiu mallonga dialogo, vi konstatas, ke ĉio povas okazi en Esperanto. Ne bezonatas tradukoj, ĉar la filmoj kaj la gestoj de la aktoroj estas tute klaraj; tio estas, la gelernantoj bone komprenas ĉion, kio okazas. Krome vi vidas, ke la dialogo tute ne estas antaŭplanita de la kursgvidanto. La interparoladoj estiĝas spontane, kaj ĉiu demando kaj ĉiu respondo dependas de la ĝusta kunteksto: en kiu loko oni troviĝas en la filmo (sur la ferdeko de la ŝipo, en la manĝejo, ĉe la ĵetkuba ludejo ktp); kiajn demandojn la kursgvidanto emas starigi (tio varias laŭ la reagoj de la individuaj lernantoj); kiel sentas sin la gelernantoj ĝuste en tiuj momentoj; kaj kion vidis la gelernantoj antaŭe, kaj kion vidos ili poste en la filmo. Ĉu hodiaŭ ili ĉiuj estas bonhumoraj, aŭ eble, pro io estas iomete streĉitaj aŭ estas alia influofaktoro prikonsiderinda?

Ankaŭ klare videblas, ke la dialogo, kvankam ĝi komenciĝas sub la gvido de la instruisto aŭ instruanto, transiras al la gelernantoj mem. Ĉe la komenco de la lerno-sesio, la kursgvidanto respondecas; ĉe la mezo, la gelernantoj mem prenas la respondecon; ĉe la fino, la kursgvidanto povas repreni la gvidon,

resumante, komentante, donante anekdotojn, preparolante stilon, donante hejmtaskon ktp.

Krom ĉio ĉi prinotu, ke Francisko, la lernanto, kiu meze de la dialogo prenas la rolon de kursgvidanto, starigis tre lertajn demandojn, kaj afable kaj lerte gvidis la konversacion de unu temo al alia kaj ankaŭ etendis la konversacion ekster la filmo mem, revenante al la filmo poste. Francisko estas bona instruisto. Li sekvas la stilon de la kursgvidanto, kiu ankaŭ estas afabla, helpema kaj celas paroligi la gelernantojn.

Menciindas, ke la supra konversacio ne enhavas erarojn. Tio NE estas normala, speciale je la baza kaj meza niveloj. La temo eraro-korektado, tamen, estas tre longa diskutotemo, kiun profesiaj instruistoj dum jardekoj debatadis. Ĉu korekti aŭ ne korekti? Ĉiam, neniam? Dume, poste? Parole, skribe? Supraĵe, detale? Mi rekomendas, ke aŭ vi faru la tutan lecionon sen korektado de eraroj, aŭ ke vi korektu kelkajn OFTAJN erarojn POST la leciono, ne dume. Interrompi tre interesan kaj sukoplenan konversacion pri genia filmo de Chaplin povas iom ĝeni. Sed ĉiaokaze, sekvu viajn spertojn kaj emon; sekvu vian intuicion en ĉiu momento, sed provu resti en la filmo kaj ne estigu tradician gramatikan lecionon sur la dorso de amuza filmo. Silentaj filmoj ne estas la ĝusta momento por troa korektado.<sup>2</sup>

Bonvolu memori, ke la supra skizoj kaj ekzemploj estas nur unu parto de bona kurso, speciale se la lernado daŭras longan tempon. La filmoj apartenas al la praktikiga parto de la leciono kaj ne al la instruada parto, kie la kursgvidanto pritrakas detalajn gramatikajojn. Filmaj dialogoj povas esti la ĉefa materialo de la paroliga leciono (ĉar, kiel komentite lastartikole, filmoj estas ege pli efikaj ol simplaj bildoj), sed pripensindas ankaŭ aliaj eroj, aliaj taskoj, aliaj aliroj. Mi donos kelkajn ekzemplojn.

La kursgvidanto povas doni skriban taskon, dirante: Nun en la venontaj 30 minutoj, skribu resumon pri ĉio, kion ni vidis en la filmo. Tiu skriba laboro povas esti, ankaŭ, hejmtasko. Alia eblo estus skribi tekston da la paroladoj de la aktoroj kaj prezenti la tuton kiel teatraĵon; tia teatroverka skribaĵo povas prepariĝi en grupoj de du, tri aŭ kvar kursopartoprenantoj. Tria eblo estus skribi reagon al la filmo, prikomenti la enhavon ktp. Alia eblo estas, kiel hejmtasko, serĉi aldonan materialon, ekzemple, el Vikipedio, pri la filmo mem, pri Charlie Chaplin, aŭ pri silentaj filmoj ĝenerale kaj, post unu aŭ du

---

<sup>2</sup> *Noto de Mireille Grosjean*: tri el miaj artikoloj traktas ekzakte tiun taskon de la instruisto: en IPR 2014-2, en IPR 2015-2 kaj en IPR 2015-4. Ili troviĝas tie: <http://www.ilei.info/dok/peddok.php>

semajnoj, dediĉi kurson al raportetoj pri tiaj temoj. Estas senfinaj manieroj plibonigi, pliprofundigi, plivastigi la lecionon.

**Resume:** Vi ne bezonas esti profesia lingvo-instruisto por utiligi la filmojn de Charlie Chaplin por helpi al vi paroligi partoprenantojn en viaj kursoj de Esperanto. Ĉoĉo faras la duonon de la laboro por vi. Li ege klare montras la situacion kaj, kunlabore kun li, via rolo centriĝos en la kursgvidado: instigi homojn paroli pri la filmo kaj eventuale pri aliaj aferoj, kiuj rilatas la filmon. Viaj gelernantoj ne nur lernos kiel paroli Esperanton pli flue kaj pli esprimoplene, ili ankaŭ ĝuos kelkajn el la plej interesaj, amuzaj filmoj iam ajn faritaj. Ili ridos kaj la kursotempo glate fluos kaj eĉ flugos. Se vi nun instruas kurson de Esperanto, provu meti kvin minutojn da senvoĉa filmo en vian lecionon. Se tio kaj la paroliga efiko bone sukcesas, provu meti tian materialon en ĉiujn viajn lecionojn. Post kiam vi lernos kiel bone utiligi senvoĉajn filmojn, vi povos pli kaj pli longigi la tempon, kiun vi uzas por ili. Vi eĉ povos fari tutan kurson per la filmoj de Charlie Chaplin, sed tio estas alia temo por alia momento. Bonan instruadon, kaj ĉefe bonan paroligadon kun via helpanto Charlie Chaplin!

## Ardo kaj pasio

*de Mireille GROSJEAN, Prez. de ILEI*

En Madrido ni havis la okazon gustumi ardon kaj pasion ĉe niaj talentaj hispanaj kolegoj. Tio ĉefe okazis dum unu el la vesperoj de nia Kongreso en la hispana ĉefurbo: „**Vivu la teatro!**” La poeto, artisto kaj reĝisoro de tiu spektaklo, supozeble ankaŭ la kreinto de tiu farmaniero, stilo, evento, estas Miguel Fernández. Kunlaboris brile Ana Manero kaj Miguel Gutiérrez Adúriz /Liven Dek. La vespero ebligis al ni la kongresanoj aŭdi deklamadojn prezentitajn de diversaj partoprenantoj el la kongresanaro. Miguel sukcesis instrui al ili la farmanieron, kiu gvidas al ne forgesebla spektaklo: la deklamontoj elektas poemon aŭ prozeron en rilato kun la vespera temo, kiu en Madrido estis „virinoj”. Miguel elektas muzikon por ĉiu parto. La deklamonto iras al la scenejo; en tiu momento aŭdiĝas la muziko en rilato kun la deklamota teksto. La deklamonto iras al sia mikrofono, sed restas 2 metrojn staranta malantaŭ ĝi. Muziko sonas kaj etoso estas naskiĝanta. La deklamonto fariĝas deklamanto paŝante ne flankiĝante, digne kaj solene al la mikrofono. Lerta teknikisto mallaŭtigas la muzikon kaj aŭdiĝas la literatura

teksto sur akompananta muzika mallaŭta tapiŝo. Post la fino de la prezento la deklaminto retropaŝas trankvile kaj la muziko aŭdiĝas pli laŭte. La admirantaj aŭskultantoj spiras post koncentriĝo. Miguel mem deklamis siajn poemojn kun tiu hispaneca ardo kaj pasio. Ĉiuj estis kortuŝitaj, kiam japanino kaj ĉinino deklamis tekstojn de Verda Majo, japanino pacbatalanto, kiu edziniĝis al ĉino kaj el Ĉinio dum la dua mondmilito apelaciis al paco alparolante la japanajn soldatojn militantajn en Ĉinio. (Memoru la tekston de la Komuna Legado de ILEI 2017). Tekstoj de Marjorie Boulton ne mankis. Amuzaj skeĉoj de Liven Dek ne mankis kaj alportis humuran momenton tre ĝuindan. En tiu vespero, en tia vespero, ni ne nur ĝuis eventon, sed niaj literatureroj naskiĝis al reala vivo, eliris el la literoj, frazoj, versoj kaj libroj por soni al niaj oreloj kaj tuŝi nian koron. Koran dankon al ĉiuj artistoj! En Lisbono okaze de la UK iom simila evento okazis, ĉar la sama skipo gvidis la solenan finon de la Belartaj Konkursoj de UEA. La kongresanoj povis ankaŭ malkovri tian eventon kaj aŭdi kortuŝajn deklamadojn.

En Lisbono okazis **la Tago de la Lernado**, organizita de ILEI kaj evoluanta dum la tuta mardo. Tie ankaŭ okazis deklamado tute ne atendita, sed forte aplaŭdita. Nia kubdevena kolego **Julián Hernández Angulo** havis prezenton pri la kultura dimensio de Esperanto dum la instruado de Esperanto en Kubo. Fine de sia prezento li deklamis poemon sian „**Mia Esperantujo**” arde kaj pasie, tiel ke la publiko preskaŭ ploris. Ĉar mi en Lisbono devis reĝisori la Internacian Artan Vesperon, mi petis de li, ke li tie ankaŭ deklamu sian poemon. Tion li faris. Tamen ofte la dua fojo ne tute similas al la impresa unua fojo. Okazis, ke la mikrofono iom pendis antaŭ li, kaj la teknikisto ne povis korekti tion, do restis por teni la mikrofonon dum la deklamado. En la unua vico Nelida Weidmann filmis, kiu nun (en oktobro) estas muntanta filmeton pri tiu prezento de Julián. Fakto estas, ke tiu belega kaj inspira teksto de Julian fariĝis nia Komuna Legado okaze de la Tago de la Libro, la 15-a de decembro 2018. La filmo de Nelida aperos en la YouTube-kanalo de ILEI: „Esperanto + Edukado ILEI”. Tiu programo de ILEI nomita **Komuna Legado** havas ankaŭ sian Facebook-paĝon.

Kaj nun kio por ni instruistoj? Ĉu ni nur sidas en la publiko kaj aŭskultas deklamantojn? Tute ne. Ni instruas, tio estas, ke ni devas prezenti ĉiun tagon novan programon (mi ne diras „spektaklon”) al la sama publiko, nia klaso. Ni komprenas, ke tio estas giganta defio. Kompreneble ni devas zorgeme prepari niajn lecionojn, niajn klarigojn, niajn ekzercojn, la etajn paŝojn digesteblajn de niaj gestudentoj. Kompreneble ni ne devas eksplodi el nia entuziasmo kaj ĝeni la klason per tro subjektivaj krioj kaj troigitaj

tielnomataj faktoj. Kompreneble ni devas sobre, digne kaj prudente instrui kaj trovi fulmrapide la taŭgajn respondojn al la demandoj de la scivolemaj lernantoj. Sed **ardo kaj pasio** devas animi ankaŭ nin, doni al niaj frazoj flugilojn, por ke ili ne nur atingu la cerbon de niaj studentoj, sed ankaŭ la koron. Tiel kaj nur tiel niaj lernantoj memoros pri la enhavo de niaj atentokaptantaj lecionoj. Ĉar la instruado povus okazi, kaj jam okazas foje, ankaŭ per robotoj, per komputilprogramoj. Tiuj kursoj portitaj de modernaj iloj povas esti tre bone konstruitaj. Sed mankas al ili ardo kaj pasio por korduŝi la lernantojn. Iu florbukedo subite aperanta sur la ekrano okaze de sukceso ne same efikas.

## Komuna Legado okaze de la Tago de la Libro, la 15-a de decembro 2018

Post Tibor Sekelj (2016) kaj Verda Majo (2017) aperas en 2018 Julián Hernández Angulo el Kubo. Li estas profesoro pri pedagogio, sed ankaŭ kantisto kaj poeto. En Lisbono, kadre de la UK, ni povis malkovri unu el liaj tekstoj: „Mia Esperantujo”. Jen nia teksto por la nuna jaro.

Tiu teksto estas konfeso lia, belega brila himno al nia kara lingvo. Tiu teksto korduŝos nin, informos nin kaj donos al ni multajn diskuttemojn por niaj kursoj kaj renkontiĝoj. Eble vi sentos emon verki pri la sama temo... En tiu kazo bonvole sendu vian tekston al la redakto de IPR. Se en viaj kursoj aŭ diskutrondoj aŭdiĝas interesaj komentoj, bonvole sendu ilin ankaŭ al ni. Se vi kreas demandaron por viaj studentoj pri tiu teksto de Julian, bonvole sendu ilin al ni kaj ili aperos en la Facebook-paĝo „Komuna Legado okaze de la Tago de la Libro ILEI” kaj en nia retejo [www.ilei.info](http://www.ilei.info).

## Mia esperantujo

*de Julián HERNÁNDEZ ANGULO (Kubo)*

Mia esperantujo estas la detaloj, kiujn mi ne preteratentas, por ke la movado pli kaj pli evoluu kaj fruktojn donu kaj por ke kresku en niaj membroj sento de aparteno...

Mia esperantujo estas la faktoj, kiujn mi produktas kaj kreas, por ke nia lingvo estu pli sencohava kaj konvinkoveka...

Mia esperantujo estas la aranĝoj, en kiuj mi partoprenas, por doni kaj ricevi, por lerni pri historio kaj kulturo de mia eta lando, por dividi spertojn kaj por nutri mian esperantistecon kaj animon...

Mia esperantujo estas miaj oftaj kontaktoj kun esperantaj libroj kaj alispecaj materialoj, kiuj igas min pli kompetenta kaj klera kaj faras mian verdan vivon prospera...

Mia esperantujo estas miaj ĉiutagaj etaj kontribuoj al la asocio kaj al la monda komunumo, ĉu varbante, ĉu parolante kun novuloj, ĉu verkante, ĉu esplorante, ĉu respondante leterojn, ĉu gastigante samideanojn, ĉu ĉiĉeronante vizitantojn, ĉu akceptante diferencojn de la aliaj, ĉu helpante ĉiujn diversmaniere...

Mia esperantujo estas la amikeco, kiun mi konstruas, kiu igas min senti hejme pli kaj pli homa, pli ĝaja kaj pli feliĉa aliloke, alilande,...

Mia esperantujo estas mia bona kaj malbona uzado de la akuzativo, mia nekompreneo de korelativaj vortoj, miaj ludoj per prefiksoj kaj sufiksoj, miaj timoj paroli, mia kuraĝo deklami, miaj ĝuoj kunkanti, nia libroservo, nia biblioteko...

Mia esperantujo estas mi, vi, ŝi, li kaj la aliaj, ni duope, trio, kvarope, okope, deko, pli, kiuj Esperante klubas, interparolas, praktikas kaj eĉ geedziĝas...

Mia esperantujo estas miaj trajtoj kaj viaj trajtoj kaj la pontoj kreataj de ni, por ke nia lingvo iru antaŭen...

Mia esperantujo estas kiel mi subordigas kelkajn miajn ŝatojn kaj preferojn por la bono kaj prospero de la grupo, de la kolektivo, de la rondo familia, de la asocio, de la komuna ideo.

Mia esperantujo estas la pioniroj kaj nepioniroj, kiuj daŭre kreas esperantistajn valorojn, por ke niaj celoj estu pli plenumblaj, aŭdeblaj kaj kompreneblaj de eksteruloj kaj por ke niaj idoj sentu sin pli dankemaj kaj fieraj pri ni...

Mia esperantujo estas niaj aranĝoj, niaj renkontiĝoj, niaj kongresoj, niaj deziroj, ke Esperanto progresu kaj estu ideo pli komprenebla por ĉiuj...

Mia esperantujo estas via kaj mia Zamenhof, via kaj mia flago, via kaj mia himno, viaj kaj miaj simboloj, viaj kaj miaj pioniroj kaj elstaruloj...



Mia esperantujo estas vi, li, ŝi, ni, ili kaj mi. Niaj virtoj kaj malvirtoj, niaj klopodoj kaj atingoj, nia lingvo, nia lingvo, nia lingvo.

Mia esperantujo estas Mi estas Esperanto, Mi estas Esperanto, Mi estas Esperanto.

## Dialogo inter Luiza CAROL kaj Mirejo GROSJEAN

### DEK JAROJ EN ESPERANTO-LANDO - parto 6 lasta

*En 2015 Luiza verkis eseon, rande de kiu Mirejo komentas kaj faras demandojn, kiujn Luiza respondas. (La unuaj 5 partoj aperis en antaŭaj numeroj)*

Luiza: MIAJ KONKRETAJ SURPRIZOJ

Nun mi listigu kelkajn el miaj plej gravaj konkretaj surprizoj dum la unuaj dek jaroj de esploro.

§ En neniu alia literaturo mi trovis tiom multajn epopeojn kaj epopecajn verkojn! Ĝis nun mi malkovris 8 tiajn longajn belegajn versajn verkojn en Esperanta literaturo. Inter ili troviĝas „Poemo de Utnoa” de Abel MONTAGUT, unu el la plej emociantaj literaturaj majstroverkoj, kiun mi renkontis en mia tuta vivo en ajna lingvo. Ankaŭ la aliajn longajn Esperantajn eposojn mi tre alte pritaksas. Bedaŭrinde, el „Uranogedio” de Johano RICCI, mi povis legi nur etan fragmenton en antologio, ĉar oni neniam publikigis la tutan manuskripton. Tiu ĉi estis alia surprizo, ĉi-foje malĝojjiga. Similan situacion en neniu alia kulturo mi renkontis ĝis nun: verko, kiu havas grandan historian valoron (ĉar ĝi estas la unua Esperanta epopeo, verkita en 1921) kaj plej verŝajne ankaŭ grandan artecan valoron (ĉar la fragmento, kiun mi legis, ŝajnas tre bela kaj originala) kuŝas enprizonita en manuskripta formo en iu skota biblioteko! Mi esperas, ke iam (kiam?) oni organizos seriozan agadon por „liberigi” la pli ol 400-paĝan epopeon de RICCI...

§ Mi renkontis en la Esperanta literaturo kelkajn el miaj plej ŝatataj baladoj: „Minstrelo kun ĉongurio” laŭ gruza popola fabelo, „Meng Ĉiang kaj Van” laŭ ĉina popola fabelo (ambaŭ el la volumo „Ĉielarko” de Julio BAGHY),

„Teruro” laŭ islanda popola fabelo (el la poemaro „Nevideblaj fontoj” de Baldur RAGNARSSON) k.a.

§ Mi ŝatas fablojn kaj emas re-rakonti al miaj genepoj tiujn, kiujn mi preferas. La originala Esperanta literaturo aldonis al mia stoko kelkajn perlojn en tiu ĝenro: la versaĵajn fablojn „Ezopa saĝo” de Kolomano KALOCSAY kaj „Kritiko” de Reto ROSSETTI, la prozan fablon „La suno kaj la flava floreto” de Lenke SZÁSZ k.a.

§ Antaŭ ol ekkoni la originalan Esperantan literaturon, mi ofte opiniis, ke, se la rumana kulturo estus tiom vaste konata en la tuta mondo kiel la itala kaj la angla, verŝajne la rumanaj sonetoj de Vasile VOICULESCU estus same famaj kiel tiuj de PETRARCA, MICHELANGELO, SHAKESPEARE... Nun mi povas diri la samon pri la sonetserio „Amaraj sonetoj” de Marjorie BOULTON. Mi amege ricevis tiujn ĉi sonetojn en mian koron, pro la delikata humuro kaj memironio, kiu malkaŝiĝas subite nur en la lastaj du vortoj, disvastigante dolĉ-amaran lumon sur la tutan antaŭan tekston. Mi ne povas imagi ajnan leganton, kiu ne sentus la bezonon legi tiun sonetserion ankoraŭfoje, ĉi-foje kun dolĉ-amara rideto sur la mieno... Cetere, se oni petus min elekti la plej artecan modelon de flua, perfekta kaj simpla Esperanto, mi senhezite elektus tiun ĉi sonetserion. Instruistoj pri Esperanto povas rekomendi ĝin al komencantoj post nur ĉ. 2 monatoj de lernado, kondiĉe, ke temas pri plenkreskuloj. La enhavo ne taŭgas por infanoj aŭ adoleskantoj. La plenkreskuloj povas ĝui tiun legaĵon dum tre frua etapo de lernado, kun la sento, ke ili jam konatiĝas kun grandvalora trezoro de la originala literaturo en Esperanto.

§ La „Dialogo” de Julia SIGMOND estas speco de libro, kiun mi neniam vidis en alia kulturo! La kortuŝa 26-linia poemeca dialogo, verkita originale en klara kaj flua Esperanto kaj tradukita fare de samideanoj en 52 lingvojn, estas laŭ mi tre taŭga por informi plenkreskulojn pri Esperanto. Instruistoj povas uzi ĝin ekde la unua monato de instruado, por plenkreskaj lernantoj.

§ En mia koro ekzistas multaj geografiaj spacoj, kiujn mi neniam vizitis. Tamen ili ja ekzistas por mi kaj mi amas ilin, danke al dokumentaj kaj artaj filmoj, muzik- kaj danc-spektakloj kaj literaturo. Kiam mi pensas nun pri Islando, miaj unuaj mensaj asocioj estas ligitaj kun la poemoj de Baldur RAGNARSSON. Kiam mi pensas nun pri la afrika kontinento, miaj unuaj mensaj asocioj estas ligitaj kun la poemoj de Edwin DE KOCK. Mi ja sentas, ke tiuj du elstaraj esperantistaj poetoj signife malfremdigis siajn denaskajn landojn en mia koro.

§ Kantoversaĵoj estas la plej malfacile tradukeblaj beletraĵoj. Por traduki ilin, oni devas konservi kaj la akcentojn de la originala lingvo kaj la muzikakcentojn. Fari tion sen ŝanĝi iomete la enhavon de la versaĵoj... preskaŭ maleblas. Tial mi opinias, ke la originalaj kantoj ege gravas por senti la kernan karakteron de ajna kulturo. Niatempe, eksmodiĝis la kutimo parkeri poemojn. Tamen, ŝatatajn kantojn oni parkerigas senintence, almenaŭ parte. Tial, rekomendi kantojn al lernantoj povas esti tre efika instrumetodo, kondiĉe, ke la tekstoj estu verkitaj en tre flua kaj ĝusta lingvo. Kompreneble tia metodo taŭgas nur por tiuj lernantoj, kiuj ŝatas la koncernan muzikon. Mia plej ŝatata Esperanta kanto estas „Ludoviko” de Georgo HANDZLIK.

§ Mi ŝatas mikronovelojn. Mi legis milojn da ili en diversaj lingvoj kaj pere de tradukoj. Se mi demandas min nun, kiun el ili mi preferas, la unua, kiu venas en mian memoron, estas „Ne ekzistas verdaj steloj” de Liven DEK.

§ Min aparte interesas la historia periodo, kiam kristanismo ekdisvastiĝis en Eŭropo. Mi spektis pri tio dokumentajn aŭ artecajn filmojn kaj legis kelkajn atentokaptajn historiajn beletraĵojn. Unu el la plej interesaj historiaj romanoj rilate tiun temon ŝajnas al mi „La ŝtona urbo” de Anna LÖWENSTEIN. Mi ege ĝojus spekti filmon bazitan sur ĝi. La teksto ŝajnas al mi tre taŭga por aliformigo en filman scenaron.

§ Mi trovis belegajn scienc-fikciajn prozaĵojn en la Esperanta literaturo: novelojn de KONISI Gaku, István NEMERE k.a., romanojn de Jean FORGE, Sándor SZATHMÁRI, Julia SIGMOND kun Sen RODIN k.a.

§ Mi trovis bonegan psikologian romanon pri internacia paro, kiu uzas Esperanton kiel sian hejman lingvon. Temas pri „Ombro sur interna pejzaĝo” de Spomenka ŠTIMEC, kiun laŭ mi indus traduki en ĉiujn etnajn lingvojn, ĉar tia romano informas pri la socia fenomeno nomata „Esperanto” pli ol iu ajn prelego.

§ En neniu alia literaturo mi trovis tiom grandan procenton de beletraĵoj pri ekologio, naturprotektado kaj vegetarismo. La plej gravaj ŝajnas al mi la scienc-fikcia epopeo „Poemo de Utnoa” de Abel MONTAGUT, la novelo „La kokido” de Istvan NEMERE kaj la scienc-fikcia romano „Libazar kaj Tero” de Julia SIGMOND kun Sen RODIN.

§ Mi trovis belegajn amuzajn kaj facilajn aventur-romanojn de Jean FORGE, LORJAK, Claude PIRON k.a.

§ Mi trovis en Esperanta literaturo malnovan ĝenron, kiu ŝajnas malaperinta en niatempaj kulturoj: temas pri la filozofia dialogo. „Dio, Psiĉjo kaj mi” de Claude PIRON estas ĝuste tia beletraĵo, kiu tamen tute ne impresis min kiel eksmoda. Ĝi ŝajnis al mi ege emociiga fantaziaĵo, preskaŭ scienc-fikcia priskribo de iu originala, poemeca spiritisma vizio, en kiu interplektiĝas aŭtobiografiaj elementoj.

§ Je mia surprizo mi trovis en Esperanta literaturo klasikan versan dramon, respektantan la aristotelajn regulojn pri unuecoj de spaco, tempo kaj agado! Temas pri la elstara klasikaĵo „Klitemnestra” de Maŭro NERVI.

§ Krom biografiojn kaj intervjuojn mi legis ankaŭ kelkajn beletraĵojn pri la familio ZAMENHOF. El tiuj min aparte emociigis la dramo “Ni vivos” de Julio MODEST, kiu fokusiĝas sur la fascinan personecon de Lidja ZAMENHOF.

§ Relative multaj Esperantaj beletraĵoj estas verkitaj precipe por infanoj. Ilin legas ankaŭ plenkreskuloj, ĉu por sia propra plezuro, ĉu por plezurigi siajn gefilojn, genevojn, genepojn ktp. Mi legas tiajn librojn kaj por mi mem, kaj por rakonti ilin al la genepoj. Laŭ mi tio estas bona metodo informi ilin almenaŭ pri la fakto, ke Esperanto estas vivanta lingvo, kiun ilia avino scipovas kaj amegas. Esperantaj rakontoj de Tim WESTOVER, Julia SIGMOND, Amir NAOR k.a. junigas mian koron, amuzas miajn genepojn kaj pensigas nin kune pri la vivo.



*Mirejo: Kara amikino! Vi verkis panoramon pri nia literaturo, kun trafa analizo de ĝenroj. Mi tre gratulas kaj dankas al vi pro via interesa eseo. Vi aldonis ie tie sugestojn por instruistoj, kiuj tutcerte interesos niajn legantojn. Kion mi aldonu? Miaj konoj etas kompare kun viaj, do mi lernis pri nia literaturo legante vin. Pro tio mi estas tre kontenta, ke tiu eseo aperas nun en nia organo IPR. Same mi en mia*

*Esperanta vivo malkovris kaj ŝategas la romanon „Ombro sur interna pejzaĝo” de Spomenka ŠTIMEC. Same mi malkovris kaj ŝategas la poemojn de DE KOCK. De afrikaj esperantistoj mi ricevis kelkfoje verkojn; tamen ili*

*ofte estas ne finverkitaj, la ĝenro estas ne tre klare difinita. Unu altiris mian atenton: „Soldatinfano” de Gilbert NIYUKURI el Burundo; tiu dekpaĝa verketo, novelo, devus aperi en verko pri la suferoj de la regiono de la grandaj lagoj, verko bukedeca kun kontribuo de diversaj aŭtoroj; mi havas ĝin en preparo; temas pri „Lagoj kaj Larmoj”. Tamen mankas al mi tempo por finverki kaj finredakti ĝin bedaŭrinde.*

*Refoje dankon, kara Luiza!*

## El kiu fonto vi trinkas?

*de Mireille GROSJEAN (Svislando)*

Mi esperantistiĝis en 1985. Tuj poste komenciĝis miaj kontaktoj kun esperantistaj afrikanoj. Okaze de tio venis al mi jena peto: „Vi eŭropanoj devas nepre verki resumojn en ĉiuj sciencoj, tiel ke ni en Afriko povus aliri al scioj per nia kara lingvo Esperanto. Tiel ni evitos la uzon de la koloniaj lingvoj la angla, la franca, la portugala...” Mi bone komprenis tiun bezonon. Sed mi ankaŭ bone antaŭvidis la gigantan laboron farendan. Imagu: trovi kemiiston por priskribi kemion, trovi fizikiston por priskribi fizikon... Sed la mondo ŝanĝiĝas kaj teknikiloj naskiĝas. Nun ni havas la Reton kaj ni havas Vikipedion. Vikipedio estas ekzakte tio, kion tiuj afrikanoj bezonis: scienca priskribo de multege da scioj kaj informoj. Nun vi aŭdis, ke nia versio de vikipedio havas pli ol 250 000 artikolojn. Mirinda kvanto! Grandega laboro! Certe vi ankaŭ scias, ke iu ajn povas kontribui kreante novan artikolon, korektante ekzistantan artikolon ĉu enhance ĉu lingve. Por mi tiu laboro ofte okazas post la 21-a horo, kiam mi ne komencas novan grandan taskon. Tiam mi migras tra la paĝoj de vikipedio kaj korektas ie ajn ion.

Kiam vi verkas en Eo aŭ tradukas al Eo, ĉu vi uzas vortaron en papera formo, ĉu PIV kuŝas apud via plumo aŭ apud via komputilo? Ĉu vi uzas [www.vortaro.net](http://www.vortaro.net), kiu estas la reta PIV? Ĉu vi uzas [www.reta-vortaro.de](http://www.reta-vortaro.de)? Ĉu vi uzas [www.eo.wikipedia.org](http://www.eo.wikipedia.org)? Bonvole observu tion. Tio estas interesa fakto. Ofte mi




iras al [www.fr.wikipedia.org](http://www.fr.wikipedia.org) (ĉar la franca lingvo estas mia denaska lingvo) kaj poste saltas al la Eo-versio [www.eo.wikipedia.org](http://www.eo.wikipedia.org), tiel mi atingas la vorton bezonatan, kaj ankaŭ pliajn informojn, ĉar temas pri enciklopedio. Tio estas mia plej ofta strategio. Mi ankaŭ ŝatas uzi la retan vortaron, ĉar tie mi trovas la vorton en diversaj lingvoj, kaj tio tre interesas min. Per tiu retejo mi ankaŭ povas trovi citaĵojn, kie la vorto aperas, kaj aŭtomate salti al vikipedio. La reta PIV estas kvazaŭ biblio. Oficiala referenco.

Konstato: Se via retkonekto estas bona, vi povas per la ebloj de la Reto havi tiujn diversajn retejojn malfermitaj sur ia skribotablo-ekrano, kaj viziti ilin laŭbezone dum verkado aŭ tradukado. Mirinda epoko!

## La koruptado de reguloj el la Fundamento.

de Johan DERKS (Serbio/Nederlando)



Estas fakto jam plimulte akceptita, sed apenaŭ konsciata, ke la Esperanta komunumo pli kaj pli malkonsideras la regulojn de la Fundamento.

Nuntempe ĉiu sin konsideranta progresinto povas partopreni diskutojn pri novvortoj aŭ kunmetaĵoj, proponante tie solvojn laŭ privata elpenso, agante kontraŭ la 11a, la 15a aŭ aliaj Fundamentaj reguloj, foje kun neglekto de la meta-lingva neceso, ke Esperanto restu relative facile lernebla lingvo.

Mi volas ĉi tie mallonge skribi pri ekzemploj de kontraŭfundamenteco rilate al la 11a regulo. Ĉiu progresinto konas la vortojn el la Unua Libro (1887): *Mi aranĝis plenan **dismembrigon** de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el senŝanĝaj vortoj. Se vi prenos verkon, skribitan en mia lingvo, vi trovos, ke tie ĉiu vorto sin trovas ĉiam kaj sole en unu konstanta formo, nome en tiu formo, en kiu ĝi estas presita en la vortaro. Kaj la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj k.t.p. estas esprimitaj per la kunigo de senŝanĝaj vortoj.*<sup>3</sup>

---

<sup>3</sup> Koncize esprimita en la 11-a regulo kiel *Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino); la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj.*

Zamenhof aprobis trarompon de tiu principo de algluiteco, ĉar skribis en n-ro 27 de la Ekzercaro: *Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo.*<sup>4</sup> Tio signifas, ke Zamenhof ne aprobas ekzemple *vaporoŝipo* anstataŭ *vaporŝipo*, ĉar en tiu nek la belsoneco, nek la klareco mankas.

Ekzistas granda kategorio da kunmetaĵoj, kiuj estas same belsonaj kaj klaraj kiel *vaporŝipo*, sed en kiuj esperantistoj grandnombre tamen *interfiksas* la literon -o. Mi celas tiujn, en kiuj la antaŭlasta litero de la flanka elemento finiĝas je a, e, i aŭ u. Se ni prenas la kunmetaĵojn kun flanka elemento finiĝanta je -eo, oni trovas ekzemple multajn kun armeo kaj video<sup>5</sup>.

- Tiujn kun arme’/o mi grupigas jene:

*Malĝustaj formoj:*

1. armeo-frakcio, armeoekzercoj, armeokolono, armeoribelo, armeoservanto, armeoestro (kontraŭfundamenta uzo de sufikso!)
2. armeoparto, armeoŝuoj (devus esti arME-PARto, arME-ŜUoj, kiel vaPOR-ŜIpo)
3. armeonobelaro (eble pravigebla pro klareco, ĉar nobelaro mem estas derivaĵo)

*Ĝustaj formoj:* armeoficiroj, armeoperacio (duobla o estus malbela)

- Tiujn kun vide’/o mi grupigas jene:

*Malĝustaj formoj:*

1. video-kasedoj, videosistemon, videodatenoj, , videomemoro, videotabuloj, videosignaloj, videokamerao, video-registraĵo, videofilmigitaj, videosignalo, videoaĵo (kontraŭfundamenta uzo de sufikso!) Senzorgema paŭsado de la vorto el nacia lingvo povus eĉ rezultigi VIDEO-kaSEdoj, VIDEO-sisTEmo ktp.

---

<sup>4</sup> Zamenhof ne mencias -o kiel nuran ekzemplon kaj tiel pravigas ankaŭ la gramatikajn finiĝojn de la tri vortospecoj je -a (unuaranga), -e (artefarita), kaj -i (nepagipova) kaj miaopinie aldone kunmetaĵojn kiel si-n-garda, ktp. Kaj kiu kuraĝas malakcepti la Grabowskiajn kunmetaĵojn abunde troveblajn en *Sinjoro Tadeo*, kie la „interfiksado” konsistas el substantiva pluralo (*Trireĝoj-festo, vicoj-kvaroj, meleagroj-ĥor’, vidaĵoj-ŝatulo, Horeŝkoj-blazono, fendoj-plena, kondiĉoj-donacon, grafkorto—mortigoj-scenejo, nodoj-ŝnuro, floroj-pentrado, kulpoj-punaro* ktp)?

<sup>5</sup> corpuseye: <http://corp.hum.sdu.dk/cqp.eo.html>

2. videokanto, videofilmo, videokurso, video-sceno, videofino, videobendo, videokarto, videoludoj (devus esti viDE-KANto, viDE-FILmo ktp, kiel vaPOR-ŜIpo)
3. videoprojekciilo (eble pravigebla pro klareco, ĉar projekciilo mem estas derivaĵo)

Pripensu, ke kun *armeo* kaj *video* ne nur aldoniĝas ekstra silabo, sed ankaŭ glota halto inter e kaj o.

- Kun *ao* mi trovis en *corpuseye* nur unu malaprobindan ekzemplon: vilaokvartalo anstataŭ viLA-kvarTAlo. Denove senbezona interfikso kun ekstra silabo kaj glota halto.

- Kun *uo* mi trovis evoluo- anstataŭ evolu-: -stadioj, -hipotezo, -historio, -gradoj, -periodoj -tempoj kaj -stato, ĉiuj malĝustaj.

- Kun *io* troveblas tri substantivoj, kiuj ofte estas kunmetataj al la ĉefelemento sen apokopo de la gramatika finiĝo: *embrio-*, *studio-* kaj *radio-*. *Embrio* liveras laŭ *corpuseye* du tiajn ekzemplojn: embrioĉela kaj embrioforma, *studio* liveras ses<sup>6</sup>. Ĉefulo estas la flankelemento *radio-* kun cent (!) malsamaj ĉefelementoj, sen konsideri gramatikajn finiĝojn kaj derivaĵojn. Estas vero, ke radi' estas polisemia radiko kun sep signifovariantoj por la substantiva vorto kaj tri por la verba vorto (Reta Vortaro). Sed tion oni ne solvas donante al ĉiuj kunmetaĵoj la saman interfiksitan -o-. *Radioprogramo* estu **radiprogramo** kaj neniu pensas ĉe tiu vorto pri radiada programo, ĉar *radiprogramo* ne povas havi tiun signifon, kiam oni difinas ĝin kiel programon, elsenditan de iu **radistacio**.

Aldone oni riskas, skribante *radioprogramo*, sugesti al malpli lerta esperantisto la elparolon RAdioproGRAMo. Erarantoj devas jes iom alkutimiĝi, sed raDI-proGRAMo estas la fundamenta kunmetaĵo.

Ekzistas centoj da aliaj kunmetaĵoj, kie esperantistoj foje malracie interfiksas o, dum sen -o- la vorto estas klara kaj bone elparolebla, sed mi traktis nur la plej evidentajn kazojn, nome tiujn, kiam la lasta litero de la radiko estas a, e, i aŭ u.

---


<sup>6</sup> studioalbumo, studiobildoj, studiodiskuta, studiomuzikistoj, studioregistradoj kaj studiosistemo, anstataŭ studialbumo, studibildoj, studidiskuta, studimuzikistoj, studiregistrado kaj studisistemo



# Kontribuo de esperantistoj al la kultura progreso de Bjelovar kaj Kroatio tra la historio

de Marija JERKOVIĆ (Kroatio)

## Ivan BAREŠIĆ- konstruisto, muzikisto kaj pasia kolektanto



Ivan Barešić estas unu el la plej elstaraj personoj de la bjelovara historio. Li naskiĝis en Bjelovar la 11-an de decembro 1880. Post la lerneja finstudo li dediĉis sin al konstruado kaj fariĝis konstrua entreprenisto. Por la Bjelovara esperantista societo plej gravas la fakto, ke en 1947, en la tiama klubo Esperanto, Barešić fondis kantokoruson de ĝia Muzika sekcio kaj komponis la marŝon

Esperantista Stelo por la tambureca orkestro.

## Fran KOLAR „Krom” - la homo, kiu donacis Esperanton al bjelovarananoj

Li naskiĝis en la vilaĝo Sedlarica la 8-an de marto 1877.

Li studis juron en Zagrebo. Pri Esperanto Kolar komencis okupiĝi en 1905 plej verŝajne en la Jura fakultato en Zagrebo, kie tiutempe aktivis kelkaj esperantistoj, sed lia poresperanta laboro pliintensiĝis post lia translokiĝo al Bjelovar, post la jaro 1906. En Bjelovar li fondis 1909 la unuan lokan Eo-societon, kiu laŭ la nuna scio



estis la tria sur la teritorio de la nuntempa Kroatio. Li komencis verki komstantan Eo-rubrikon en la bjelovara gazeto *Nezavisnost*. La plej grava fakto estas lia traduka laboro, el kiu rezultis la unua romantraduko el la kroata literaturo: la romano de August Ŝenoa *La trezoro de l' orajŝisto*, kiun li mem financis kaj eldonis en 1911.

## Vilim POLAŠEK - la plej agema promocianto de Esperanto en Bjelovar



Li naskiĝis la 7-an de aŭgusto 1910 apud Zagrebo, en Selnice. Elementan kaj komercan lernejojn li finis en Bjelovar. Tre frue ekplaĉis al li la ideoj de la kreinto de Esperanto, d-ro Zamenhof, pri egaleco de ĉiuj homoj, senkonsidere pri iliaj raso, haŭtkoloro, religia aparteno aŭ eduko kaj la ideo, ke ĉiuj homoj de la mondo interkompreniĝu per komuna lingvo. Li plenumis diversajn funkciojn en la Eo-societo Bjelovar. Por

sia multjara laboro por Eo li estis dufoje distingita de Jugoslavia Esperanto-

Ligo kaj en 1969 li ricevis skriban rekonon kaj en 1979 medalon de la Komunumo Bjelovar.

### **Željko SABOL – poeto, kiu ardis por Kroatio**

Li naskiĝis en Bjelovar la 28-an de novembro 1941. Gimnazon li finis en sia naskiĝurbo, diplomiĝis pri historio kaj kompara literaturo en la filozofia fakultato en Zagrebo.



Grandan publikan popularecon Sabol akiris kiel aŭtoro de multaj kanzonoj (ĉ. 150), kiujn kantis la plej bonaj kroataj kanzonistoj. La poemoj de Sabol estas reprezentitaj en ĉiuj pli gravaj antologioj kaj tradukitaj en la anglan, italan, francan, japanan, ĉeĥan, makedonan kaj E-on. Li estis membro de Eo-societo Bjelovar kaj gvidis kursojn de E-o por siaj lernejoj kolegoj.

### **Dragutin ŠTOKIĆ- vivo por muziko kaj Esperanto**



Post la dua mondmilito la Eo-movado en la tiama Jugoslavio tre rapide rekaptis la antaŭmilitan ritmon kaj en multaj segmentoj eĉ pliboniĝis. Enkadre de Jugoslavio, en la aktivajoj pri Eo, Kroatio ĉiam elstaris. Fondado de Esperantaj societoj post la milito komenciĝis en Zagrebo, sed tre rapide disvastiĝis ankaŭ al aliaj urboj, en kio Bjelovar estis bonŝanca pro la relativa proksimeco de Zagrebo. En 1945 en Bjelovar inter la kunfonditoj troviĝis ankaŭ la razisto Dragutin Štokić, granda muzikŝatanto. Tuj en la komenco estis formita Muzika sekcio en la Eo-asocio, kiun gvidis Dragutin Štokić. Li fondis tamburecan orkestron. Unu el la unuaj prezentoj de tiu orkestro en iu Eo-aranĝo estis la koncerto dum la unua postmilita jugoslavia Eo-kongreso en Varaždina en 1947. Ĉiuj membroj de la orkestro, samtempe kun la muzikado, lernis ankaŭ Esperanton.

## **Improvizado**

*okazinta en Novjara Renkontiĝo kaj en IFEF-kongreso (fervojistoj) kadre de la JARO DE LA LERNANTO (2016-2017)*

*de Mireille GROSJEAN (Svislando)*

La ideo estis **kapti la emojn de diversaj personoj pri diversaj lernmetodoj laŭ diversaj aĝokategorioj**. En du internaciaj kunvenoj Mireille Grosjean lanĉis la prezenton, improvizis kun personoj el la publiko kaj kolektis

grandajn paperojn kun glucirkloj montrantaj la emojn de la partoprenantoj laŭ aĝokategorioj.

Ĉu el tia aktivaĵo oni sukcesas ekscii pri la lernmetodoj, ni vidu.

## Lernsituacioj

1. **Severa instruisto** kun okulvitroj sur nazopinto staranta antaŭ sidanta klaso. Li prelegas kaj rifuzas respondi demandojn.
2. **Tandemo**. Du studentoj lernas kune kaj parolas inter si, havas komputilojn, komparas rezultojn, interŝanĝas informojn.
3. **„Usonstila” instruisto**, mojosa, sidas kun piedoj sur sia skribotablo kaj debatumas kun siaj studentoj.
4. **Malferma studado**: la instruisto respondas al demandoj de la lernantoj, kiuj ricevis la kurson antaŭe rete.
5. **Klaso studas memstare**, sen instruisto. Debatoj, demandoj kaj respondoj.
6. **Privata leciono: mentoro** instruas al lernanto.
7. **Per telefono**: Iu sola tenas sian telefonon kaj studas per iu reta kurso.
8. **Per libro**: Iu sola sidas en buso kaj studas el libro.
9. **Per komputilo**: Iu sola sidas kaj uzas komputilon.
10. **Per aŭskultado**: Iu sola kuŝas kaj aŭskultas en la reto ion en la lernenda lingvo

## Taksado

Partoprenantoj ĝis la aĝo 18 uzis flavajn glucirklojn.

Partoprenantoj inter 18 kaj 45 uzis oranĝkolorajn glucirklojn.

Partoprenantoj post la aĝo de 45 uzis ruĝajn glucirklojn.

La partoprenantoj metis poentojn sur siaj glucirkloj, skribante la nombron de poentoj sur la glucirkloj:

*10 Mi tre tre ŝatus lerni tiel.*

9

8

...

*1 Mi tute ne ŝatus lerni tiel*

Ili gluis siajn glucirklojn sur ĉemura papero, kie aperis la titoloj de la lernsituacioj.

Tiel ILEI-anoj povas nun „science” kapti, kompreni, kiu lernsituacio plaĉas al kiu aĝogrupa.

La rezulto ne estas tute kontentiga, ĉar la aĝogrupoj sub 18, do infanoj kaj adoleskantoj, estis malgranda. Do la sumo de la rezultoj de tiu aĝokategorio estas sensignifa. Ĝi ne aperas sur la tabelo.

La sumo de la rezultoj estas malalta. Entute aperis 312 glucirkloj. Konsekvence oni ne povas dedukti ian „sciencan” konstaton. Ni konsideru tion kiel amuzon. Amuzo estis, ĉar la improviza talento de Mirejo ne aparte brilas, la partopreno de la publiko estis foje brila, foje pigra... Ne eblis kadre de unu vespero ekzerci dek skeĉojn kaj prezenti teatraĵon.

Tamen la rezultoj estas instruaj, ĉar foje regas tre klara samopiniado pri unu skeĉo. Alian fojon la emoj iras de 10 ĝis 1...

Vidu la tabelon!

<b>Lernmetodo</b>	<b>Partoprenantoj inter 18 kaj 45</b>	<b>post la aĝo de 45</b>
<b>1. Severa instruisto</b>	–	3,04 (el 26 indikoj)
<b>2. Tandemo</b>	5,50 (el 1 indiko)	5,20 (el 35 indikoj)
<b>3. „Usonstila” instruisto</b>	5,0 (el 2 indikoj, 8 kaj 2)	3,72 (el 29 indikoj)
<b>4. Malferma studado</b>	8 (el 1 indiko)	6,5 (el 28 indikoj)
<b>5. Klaso studas memstare</b>	5 (el 1 indiko)	4,30 (el 27 indikoj)
<b>6. Privata leciono kun mentoro</b>	1 (el 1 indiko)	4,71 (el 31 indikoj)
<b>7. Per telefono</b>	10 (el 2 indikoj)	2,45 (el 29 indikoj)
<b>8. Per libro</b>	6,50 (el 2 indikoj)	7,47 (el 30 indikoj)
<b>9. Per komputilo</b>	9,50 (el 2 indikoj)	6,45 (el 31 indikoj)
<b>10. Per aŭskultado</b>	9 (el 1 indiko)	6,06 (el 32 indikoj)

*Kelkaj rimarkoj pri la rezultoj de la taksado de pliaĝuloj:*

Pri la numero 1: la meznombro estas 3,04, vidiĝas pinto ĉe 4 kaj 5 poentoj, kaj alia pinto ĉe 0 kaj 1 poento. Do kameleca Gaus-kurbo kun du ĝiboj.

Pri la numero 2: la meznombro estas 5,20 kaj la distribuado estas regula, ebena, de 1 ĝis 10.

Pri la numero 3: la meznombro estas 3,72, vidiĝas pinto ĉe 2 kaj 3 poentoj kaj alia pinto ĉe 8 poentoj. Do kameleca Gaus-kurbo kun du ĝiboj.

Pri la numero 4: la meznombro estas 6,5, vidiĝas pinto ĉe 5 kaj alia pinto ĉe 9. Do kameleca Gaus-kurbo kun du ĝiboj.

Pri la numero 5: la meznombro estas 4,30 kaj la distribuado estas regula, ebena, de 1 ĝis 10.

Pri la numero 6: la meznombro estas 4,71 kaj la distribuado estas regula, ebena, de 1 ĝis 10.

Pri la numero 7: la meznombro estas 2,75 kaj vidiĝas klare unu ĝibo ĉe 0, 1, 2, 3. Do la pli aĝaj personoj ne ŝatas lerni per telefono.

Pri la numero 8: la meznombro estas 7,47 kaj vidiĝas klare unu ĝibo de 5 ĝis 10. Do la pli aĝaj personoj ŝatas lerni el libro.

Pri la numeroj 7 kaj 8: ili konsistigas la ekstremojn.

Pri la numeroj 9 kaj 10: kun meznombro 6,45, respektive 6,06, la distribuado estas regula, ebena, de 1 ĝis 10. Do la uzo de komputilo ne timigas la pli aĝajn personojn.

## El la landoj kaj sekcioj...

### Benino

**Kunveno de Karlo Alofa, sekciestro en Benino kaj Mireille Grosjean, prezidanto de ILEI** (*Kotonuo, Benino, la 3-an de novembro 2018*)



Karlo Alofa priskribis la situacion en Benino kaj akcentis, ke ĉiuj devas labori kune, ĉu la membroj de la tutlandaj asocioj, ĉu la membroj de la ILEI-sekcio. Informado kaj instruado de Esperanto estas ĉies taskoj.

Mireille Grosjean kaj Karlo Alofa povis kontroli la liston de la membroj en Benino, kiuj ricevas membrecon pere de la Koleg-Helpa Kaso. Kune ili atingis interkonsenton pri la listo valida por la jaro 2019.

Vasta diskuto okazis pri la Esperanto-Instruista Trejnado EIT, kiu devis komenciĝi en Kotonuo la kvinan de novembro, tamen estis nuligita. Mireille povis skizi la novajn eblojn, kiuj nun aperas.

Karlo Alofa revenis al la Kulturcentro JoCa en Kotonuo la 17-an de novembro, ĉar je tiu tago Mireille invitis la lokajn esperantistojn por neformala babilrondo. Dek ses homoj partoprenis.

*Karlo ALOFA, Mireille GROSJEAN*

## Ĉinio

### Novajoj el Zaozhuang

La unua studentaro de la Esperanta fako estas akceptita de la Zaozhuang-a Universitato. Tra aprobo de la Ministerio pri Edukado, danke al subteno de Ĉina Esperanto-Ligo, la Zaozhuang-a Universitato komencis varbi studentojn de 4-jara regula kurso de la Esperanta fako de 2018. Ĉiuj 25 studentoj de la Esperanta fako en la unua jaro 2018 jam venis el la tuta provinco Shandong kaj aliĝis en la 8-a kaj 9-a de septembro. Post la aliĝo ili tuj komencis partopreni en severa disciplina trejnado. Junulara Eo-Asocio de la Zaozhuang-a Universitato partoprenis en bonveniga aktivado de la novaj studentoj, vizitis la novan klason de Esperanto kaj prezentis la Esperantan movadon. En la 14-a de septembro, la klaso vizitis la Esperanto-Muzeon. Komprenante la bazon de Esperanto, ili diras, ke ili lernu Esperanton bone kaj klopodu fariĝi esperantistoj de nova epoko. (El Retejo de la Esperanto-Muzeo, <http://www.e-muzeo.com/shown.asp?id=397>.)

*Tradukita de Sato*

## Dominika Respubliko

### Instruado de Esperanto en Dominika Respubliko – aŭtunaj kursoj.



Alliance Française de Santiago kaj Asocio Dominika de Eo (ADE) bonvenigis 49 novajn gelernantojn de Eo, inter ili plurajn haitianojn. Ili lernas laŭ la rekta metodo, per la rakonto de Claude PIRON *Gerda Malaperis!*. Instruas R. DESPRADEL, Cseh-instruisto. La kursoj (A1.1 kaj A1.2), senpagaj, okazas unufoje semajne. Je la fino, la partoprenintoj

ekzameniĝos kaj ricevos atestilon. Eo havas ŝancon en la insulo Domingo, kie du malsamaj kulturoj (la haitia kaj la dominika) dividas la insulon. Multaj lingvaj miskomprenoj ofte okazas inter la du popoloj pro tio, ke oni parolas malsamajn lingvojn (la franca kaj la kreola haitiflanke, la hispana dominikflanke). Eo estu pontolingvo inter Haitio kaj Domingo!

*Raportis: Rafael DESPRADEL HERNÁNDEZ*

## Francio

### Poezio Tutlibera - Rezultoj de la konkurso 2018

Jen la gajnantaj poemoj de la Speciala Premio Esperanto. Tiu premio estas aljuĝita unufoje en 2018. 48 homoj partoprenis el 20 landoj, 22 el Francio, 4 el Turkio, po 3 el Unuiĝinta Reĝlando (Britio) kaj Venezuelo ktp. La plimulto estis inter-18-kaj-20-jaraĝaj. Pluraj sendis 2 poemojn, unu franclingve kaj alian esperantlingve. La ĵurio konsistis el 3 famaj poetoj de la Esperanta movado: Jesper Jacobsen, Jorge Camacho kaj Nicola Ruggiero. Tio estas sukcesa eksperimento, kiu devas esti konigita kaj referita. La gajnantino de la unua Premio partoprenos kun la aliaj junuloj en la ceremonio de la 22-a de novembro.

Unua premio: Ingrid BERGLUND (Mikael Elias Gymnasium, Sundsvall, Svedio, *vd la foton dekstre*): La devoj de la vivo.

Dua premio: Elisa ESTÉVEZ (Hejmedukata, Tabio, Cundinamarca, Kolombio): Ni estos vortoj.

Tria premio: Eva PECHOVÁ (École des Arts Appliqués, Prago, Ĉeĥio): Sen.

Pli en la retejo [www.poesie-en-liberte.fr](http://www.poesie-en-liberte.fr) (en la franca). Granda gratulo kaj danko iru al Sinjoro Gilles Tabard, kiu efike peris inter la franca registaro, la organizantoj kaj la Esperanto-movado. Ne maltrafu la konkurson 2019, denove malfermitan al poemoj en Esperanto!



## Hungario

### Pedagogia Tago kaj asembleo en Budapeŝto

La 7-an de oktobro 2018 en la asembleo de la hungara asocio de esperantistaj instruistoj (EPME) oni raportis pri la jaro 2017 kaj elektis novan estraron (pro la forpaso de unu el la estraranoj, Enikő Sereghy Zengő). Jen la nova estraro de EPME: SALOMONNÉ CSISZÁR Pálma, József ESZÉNYI kaj József NÉMETH (prezidanto). Komence de la kunveno ni laŭtlegis la salutmesaĝon de Mireille GROSJEAN, kaj ankaŭ ŝian mesaĝon okaze de la internacia tago de pedagogoj. Krom la asembleo, ni havis nian tradician pedagogian tagon. Jen la programo:

- KISS Orsika: Prezentado de mem-faritaj instruiloj por helpi la lernadon de tabelvortoj kaj afiksoj
- NÉMETH József: Rememore al Sereghyné Zengő Enikő kaj Berényi Csilla

- MÉZES Gyöngyi kaj HORVÁTH József: La historio de fiŝkursoj
- FORGÁCS Mónika: Prezento de la Instrucentro Esperamo
- Isabelle ALLARD (Francio): Prezento de projekto kaj lernometodo
- SALOMONNÉ CSISZÁR Pálma: La plej oftaj eraroj en la skribaj Esperanto-ekzamenoj 13.15-13.45.
- Du filmoj pri la parolaj Esperanto-ekzamenoj (en la filmoj la ekzamenantoj estis la ĵus forpasintaj Enikő kaj Csilla)
- Diskuto kun gvido de ESZÉNYI József: La situacio de la Esperanto-instruado en Hungario



*Parto de la partoprenantoj de la pedagogia tago fine de la kunveno*

*József NÉMETH, sekciestro*

## **Israelo**

### **Kursoj pri Esperanto**

Amri WANDEL finis Eo-kurseton „Nicocot” en mezlernejo de Modiin kun 17 lernantoj. Okazis resuma kunveno, kun 200 lernantoj de la 10-a grado en la lernejo "Oort" en Modiin.

Daŭriga kurso instruata de d-ro Doron MODAN komenciĝis en Tel-Avivo la 26-an de novembro. Ĝi daŭros 8 lecionojn, ĝis la 14-a de januaro 2019. La



horoj estos proksimume 19:50-21, la klubkunvenoj okazos inter 18:30-19:45.

La 12-an kaj 19-an de novembro okazis libervolaj distraj renkontiĝoj kun Mikaelo LINECKIJ, por la daŭrigantoj, kiuj estas malfermaj ankaŭ al la klubanoj. Amri informos la koncernajn personojn (la finintojn de la komencanta kurso).

La komencanta kurso kun Doron komenciĝos la 11.2.2019, kaj daŭros ĝis julio. Ĝi estos reklamita per anonco en Haaretz kaj per Facebook. Pli detale legu ĉi tie: <http://esperanto.org.il/dosieroj/ELIEP201811.pdf>

## Japanio

### Komuna faka kunveno de ILEI-JP kaj ILEI-KR



Okaze de la 2-a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio en la japana urbo Nara, la 12-an de oktobro, niaj du sekcioj havis kune fakan kunvenon. Ĉeestis 14 membroj, po sep el ambaŭ sekcioj. La titolo de la kunveno estis „Kiel instrui Esperanton - niaj konoj kaj spertoj”, kaj prezidis la kunvenon ISINO Masayo de ILEI-JP.

Unue, HIROTAKA Masaaki de ILEI-JP prezentis la serion da studkunvenoj per reta servo „Hangout” pri la libro *Manlibro pri Instruado de Esperanto*. Okazis la studkunveno naŭ fojojn inter septembro 2017 kaj majo 2018, kaj partoprenis en ĝi minimume kvar, maksimume ok personoj loĝantaj diversloke en la lando. Ĉiuj bezonis bazan sed certan konon pri la instruado de Esperanto, kaj ili ofte diskutis pri diversaj temoj kaj interŝanĝis opiniojn kaj spertojn. La rezulto de la studkunveno estas tre pozitiva, kaj oni utiligos kelkajn elementojn pristuditajn por siaj ontaj instruadoj.

Sekvis de korea flanko raportoj pri iliaj manieroj de Eo-instruado. PARK Yongsung „Nema” parolis pri la temo „Odal” (ĉiutaga parkerado); kiel doni al lernantoj la ŝancon mem profundiĝi pere de bonaj frazoj el *La paroladoj de Zamenhof*. Li raportis pri efikoj kaj malfacilaĵoj en gvidado en lokaj aŭ retaj kursoj. En Koreio oni organizas retajn kursojn per saĝtelefonoj por komencintoj (post enkonduka kurso). Ili laŭ sia intereso aliĝas al iuj retgrupoj kaj mem daŭrigas lernadon, sed mankas bonaj gvidantoj. Eblas facile utiligi modernajn teknikojn, sed estas alia afero ĉu oni povas vere plialtigi la lingvokapablon de la lernantoj. Ankaŭ LEE Junghee (Hela) kaj LI Hyonsuk (Jesa) parolis pri la situacio en Koreio.

ISIKAWA Tiekio el sia longjara instruado en lokaj grupoj kaj seminarioj parolis pri la temo „Gravas scii karakterojn de verboj”. Multaj, eĉ mezniveluloj, ofte erare uzis verbojn kaj ŝi atentigis precipe pri la diferencoj inter transitivaj kaj netransitivaj verboj, pri momentaj kaj daŭraj verboj. Krome, menciante sensubjektajn verbojn, ŝi montris komunajn erarojn, kiujn ofte faras kaj japanoj kaj koreoj. Kiel ekzemplo estis montrita la frazo, „Estis varmege en la flughaveno de Tokio.” Multaj koreoj kaj japanoj diras tion kiel „La flughaveno de Tokio estis varmega.” Tie videblas la influo de ambaŭ lingvoj, sed en Esperanto ni ne diras tiel. Por bone paroli en Esperanto, ŝi substrekis la bezonon bone lerni.

Japanoj kaj koreoj havas similajn malfacilaĵojn en la lernado de Esperanto pro la fakto, ke ambaŭ lingvoj apartenas al alia lingvogrupo ol Esperanto. Sed, instrumanieroj malsamas laŭ la socia medio kaj la nombro de relative novaj lernantoj. Tamen, ni povas lerni unu de la alia ion, kion certe indas provi. Tiu malofta komuna kunveno estis bona okazo plivastigi niajn kunlaborojn, sed pro manko de tempo restis iom da malkontento pri konkreta propono.

*ISIKAWA Tiekio*

## Esperanto en universitatoj

La rolo de ILEI de ĉiam estis zorgi pri instruado de Esperanto en movadaj kursoj kaj en lernejoj kaj lertigi la instruistojn.

Kiam oni parolas pri lernejoj, kompreneble oni parolas pri ĉiuspeciaj lernejoj de infanĝardenoj al universitatoj.

En la universitata kampo Esperanto jam atingis multon kaj ne necesas redetaligi por esperantistoj la kursojn de Esperanto kaj de interlingvistiko, kiuj ekzistas en pluraj landoj de la mondo. Cetere ili estas jam listigataj en la inform-banko de [www.edukado.net](http://www.edukado.net).

Eble tamen ni aparte citu la plurjarajn programojn pri studoj pri tiuj temoj en la universitato de Poznano, Pollando. Nova paŝo en tiu direkto estas la kontrakto kun la universitato de Zaozhuang, Ĉinujo, kiun UEA kaj ILEI subskribis en Lisbono 2018.

Sed por kunordigi la multajn agadojn kaj ankoraŭ pli grandigi la aperon de Esperanto kaj interlingvistiko en universitatoj de ĉiuj landoj, ILEI pli-grandigis sian komisionon pri universitata agado, kunordigitan de Duncan Charters; ĝi nun komencis labori kunligite kun ESF, *Esperantic Studies Foundation*, kiu siavice intencas pliigi sian agadon en ĉi tiu kampo.

Sekve de ĉi tiuj antaŭkondiĉoj. ILEI nun invitas ĉiujn siajn landajn sekciojn kaj membrojn doni atenton al la agadkampo „Esperanto en universitatoj”, por ke en ĉiu lando estu almenaŭ unu universitato, kie Esperanto aŭ interlingvistiko estu instruata. Tio donus prestiĝon kaj ebligus pli fruktodonajn rezultojn de la cetera agado en lernejoj de aliaj niveloj kaj ankaŭ ekster lernejoj.

La komisiono pri universitata agado de ILEI kunlabore kun ESF helpas laŭbezone.

*Mireille GROSJEAN*  
*Prezidanto de ILEI*

# ILEI-kongreso 2019

Bonvenon en Ĉaĉak, Serbio, 13 – 20 julio 2019



Kun ILEI en Ĉaĉak vi:

- Lernos kaj lernigos, interŝanĝos spertojn kaj ideojn, plilertiĝos
  - Ĝuos la ILEI-kongresan etoson, amikumos, amuziĝos
    - Ekkonos Serbion kaj gastamon de ĝiaj homoj
- Admiros ĝiajn kulturen heredaĵon kaj belecon de la naturo
  - Frandos specialaĵojn de loka gastronomio
- Komprenos pli bone la hodiaŭan realon de la lando
  - Trovos spurojn de prahistoriaj kulturoj
  - Vizitos historiajn lokojn de la Romia Imperio
- Renkontos lingvojn kaj kulturojn el la tuta mondo
  - Povos prezenti viajn lingvon kaj kulturon

Ĉu vi jam aliĝis? La paperan aliĝilon vi ricevis en la pasinta numero de IPR kaj la elektronikan vi atingos per <https://goo.gl/forms/TOrY5bltJtK0BKcG2>.

Pliajn informojn vi trovos ĉe <http://www.ilei.info/agado/konferencoj.php> aŭ petu de [ilei.kongresoj@gmail.com](mailto:ilei.kongresoj@gmail.com).

*Partoprenu kaj ĝuu, pliriĉigu la kongreson  
per viaj ĉeesto kaj programkontribuoj*

*Radojica PETROVIĆ,  
Estrarano pri Kongresoj*

## INFORMOJ PRI ILEI

### Laborkomisionoj

- Ekzamena:** Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Christophe Chazarein, Mónika Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.
- Elekta:** Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Rob Moerbeek.
- Kontrola:** Simon Smits, Orlando Raola.
- Lerneja:** Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.
- Regulara:** Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: M. Grosjean.
- Terminara:** Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.
- Universitata:** Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko”, Goro Kimura, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat, Vicente Manzano Arrondo. Estrare: Ivan Colling.

### Enmovadaj partneroj (entute 14)

- E@I** (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, [info@ikso.net](mailto:info@ikso.net). Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.
- Fondaĵo edukado.net** - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: [redaktanto@edukado.net](mailto:redaktanto@edukado.net).
- ICH** (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, [zsofia.korody@esperanto.de](mailto:zsofia.korody@esperanto.de).
- IFEF** (Internacia Fervojistista Esperanto-Federacio): *vd. la Jarlibron de UEA*
- TEJO** (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Arina Osipova**.
- UEA:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, [www.uea.org](http://www.uea.org). Observanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Stefan MacGill**.

*kaj aliaj*

### Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

- ALTE** (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,
- FIPLV** (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.
- UN** (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro**.
- Unesko** (kun statuso de observanto): Repr. de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, [monique.arnaud@aliceadsl.fr](mailto:monique.arnaud@aliceadsl.fr), **Jean-Pierre Boulet, Pascale Voldoire, Marie-Sylvie Julian, Emmanuel Desbrières**.

*kaj aliaj*

## Membreco kaj pagado por diversaj servoj

**Membreco kostas 20 € en A-landoj** (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan *IPR* kaj paperan *Juna Amiko*. Tio kostas por A-landanoj 32 EUR kaj por B-landanoj 18 EUR. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna Amiko* akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

\* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

\* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

\* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

## Redakciaj informoj

**Respondeca eldonanto** (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, [jozefo.nemeth@gmail.com](mailto:jozefo.nemeth@gmail.com), [www.ilei.info/ipr/](http://www.ilei.info/ipr/); tel: (+36-70) 931-0530.

La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando*, <[moerbeekr@gmail.com](mailto:moerbeekr@gmail.com)>.

**Ni fermis la nunan numeron la 15-an de novembro 2018,  
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de januaro 2019.**



*ILEI-kongreso 2019 - Bonvenon en Ĉaĉak, Serbio, 13 – 20 julio 2019*



